


Revuo
ESPERANTO

Internacia

N-ro 563 (10)

OKTOBRO 1952



La Internacia Altlernejo en Helsingør, Danlando

(vidu paĝon 261)

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio

Fondinto : H. HODLER

Redaktoro : HANS JAKOB

Helpredaktoro : MASON STUTTARD

Ĉion por la redakcio sendu al
ESPERANTO
Palais Wilson, Genève, Svis.
Urgajn informojn sendu rekte
al Rickmansworth

Traduko kaj represo de artikoloj estas
permesataj, kondiĉe ke oni citu la fonton.
Oni sendu tian represaĵon al nia redakcio.

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la
revuo ESPERANTO, abonado, reklamoj,
anoncetoj sendu al
UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Heronsgate, Rickmansworth, Herts.,
Anglujo

Jara abono (1953) : 15 ŝil. anglaj (kun
membrecio kaj jarlibro 20 ŝil.)
Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj

Tarifo por reklamoj :
1 paĝo £6 ½ paĝo £3
¼ paĝo 30 ŝil. ⅙ paĝo 15 ŝil.
Anoncetoj pri korespondado :
2 pencoj por unu vorto aŭ 1 int. respond-
kupono por ĉiu duo da vortoj

Legantoj en 74 landoj
Eldonnumero 6000



Enhavo

	Paĝo
La 37-a Universala Kongreso de Esperanto :	268
La Signifo de Niaj Kongresoj : <i>D-ro Ivo Lapenna</i>	267
La 38-a Universala Kongreso de Esperanto :	
De l'Nordo al Sudo ! Zagreb 1953 : <i>Hans Jakob</i>	257
La teatro en Jugoslavujo : <i>Franjo Majetiĉ</i>	279
Specialaj artikoloj :	
S-ro Trygve Lie estas amiko de Esperanto : <i>D-ro Breth</i>	259
Reformado de la japana skribsistemo : <i>Sigeo Matumoto</i>	269
Pri Parfumoj : <i>D. R. Collins</i>	277
Nia Dometo : <i>R. Edis Fairbairn</i>	283
La Alaska Stafeto : <i>H. Fridén</i>	285
Kastelo de Gresillon : <i>R. Watier</i>	265
Poezio :	
Nuda Vero : <i>Brendon Clark</i>	286
Sendefendaj Manoj : <i>Brendon Clark</i>	281
La Stumpaj Arboj : <i>R. Rossetti</i>	280
Konstantaj Rubrikoj :	
Enigma Konkurso N-ro 71	282
Esperantista Vivo	284
Internacia Konkurso 1952	276
Nia Forumo	275
Oficiala Informilo	288
Radio kaj Esperanto	287
Tra la Libraro	272
Tra la Mondo Esperantista	260

Revuo

ESPERANTO

Internacia

N-roj 563 (10)

Oktoebro 1952



De l' Nordo

al Sudo!

Zagreb 1953

LA decido de la Estraro de UEA dum Pasko pasinta, prokrasti inviton de Amsterdam por nia 38-a Kongreso kaj akcepti tiun de Zagreb, havas kiel ĉefan kaŭzon la nepran neceson manifesti la universalecon de nia movado. La postmilitaj kongresoj estis por tiel diri "okcidente lokitaj" (Bern, Bournemouth, Malmö, Paris, München kaj Oslo). Trudiĝas nekontesteble la devo, migri al orient-sudo. Krom tiu ĉi argumento, kiu pledis favore por Zagreb, estas kelkaj aliaj, ne malpli gravaj. Utilas ilin konigi al la publiko Esperantista, por ke regu klareco inter ni pri tiom grava afero, kia estas nia ĉiujara manifestacio, videbla dokumento de nia ekzisto.

De Esperanto-politika vidpunkto estas nia devo morale subteni la jugoslavan branĉon de nia movado. La tuta orienta parto de Eŭropo estas ja hermetike fermita por ni. La procedo pereigi progreseman senpolitikan movadon, kia nun estas la penado por enkonduki neŭtralan helplingvon, kiel ĝi okazis kaj okazas en la orient-eŭropaj landoj, fatale memorigas epokon inter 1933-1936. La ekstretoj sin tuŝas! La submetigo

de ĉio kio ekzistas en la vivo al ŝtata doktrino, la forigo de ĉia libereco de pensado kaj de sen-politika agado por ia idea celo, estas ja kontraŭ la homa naturo. La tezo "unu kredo, unu regno, unu estro" ĉiam kunpuŝiĝas je la sento de sendependeco.

Jugoslavujo estas la sola regno sin liberiganta de stato de vasaleco. Neniel cedante en la transformo ekonomia (produktado per la popolo por la popolo), adaptante tiun ĉi formulon al praktikaj bezonoj de la lando, la registaro jugoslava konsentis je sufiĉa libereco en sferoj, kiuj en apudaj landoj estas netolerataj. Esperanto povas libere disvolviĝi: ĝi povas kalkuli je favora apogo flanke de regantaj povoj. Pruvu tion la regule aperanta revuo *Suda Stelo*, montrinda periodaĵo pro formo kaj enhavo. Spite la perdojn kruelajn dum la pasinta milito, la nombro de niaj batalantoj estas pli alta ol antaŭe. Esperanto estas movado en Jugoslavujo kaj ne ia manpleno da mondfremdaj lingvemuloj.

Estas grava eraro de ne malmultaj okcidentanoj prijuĝi orienton kaj sudon de Eŭropo laŭ la stato de teknika kulturo. Ĝia ĝeneraligo

esprimiĝanta en elektrigo, maŝinigo de la vivo estas ja salutinda. Sed la feliĉo de la homaro ne troviĝas en posedo de elektraĵlavmaŝinoj, raziloj, de aŭtomobiloj, inkluzive de Jazz-muziko, k.t.p.

Jugoslavujo, revo de plej bonaj spiritoj kroataj, serbaj kaj slovenaj, ekestiĝis el larmoj, ŝvito kaj sango. Vivintaj sub diversaj reĝimoj, la kunordigo de tiom variaj elementoj estis giganta tasko. Post la dua milito (por parto de jugoslavoĝi estis la kvina milito depost 1875) montriĝis, ke ne estas eble fliki la restojn de la pasinto. El centre direktita reĝlando fariĝis federala respublikaro. La komplete detruitaj

industrio kaj agrikulturo vokis je nova formo de produktado. Memorigante tion, ni celas influi tiun ĉi sintenon okcidentan, tiun ĉi netolereblan opinion de ne malmultaj "esti superaj". Inter la slavoĝi, tiuj de la Suda Eŭropo devis sperti subpremon kelkcentjaran. Hodiaŭ ree la sudslavoĝi defendas liberecon de Eŭropo kiel iam en la pasinto !

Ekzistas ankoraŭ en tiu ĉi landaro la gastameco, senkonvencia, natura. Ni ĉiuj kiuj vizitos la "Regnon de la slavoĝi de l'Sudo" konstatos, ke tiu ĉi diraĵo estas objektiva. Zagreb estos brila ŝtono en la mozaiko de niaj kongresoj.

Hans Jakob.

Lernejaj Familioj per Esperanto

Nova laboro por la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

REZULTE de diskutado kaj aprobo en ILEI kunveno en Oslo, kaj pro la helpo de F-ino Tegg (Anglujo), kiu konsentis peradi la petojn, ILEI starigis planon por lernejaj familioj Esperantistaj. La intenco estas, ke **tri** aŭ **kvar** lernejoj formu familion kaj interŝanĝu regule, ĉiu kun la aliaj du aŭ tri, en diversaj landoj.

Povas esti du metodoj :—

- (1) Kiam nur la instruisto scias Esperanton, kaj sendas, kun klarigoj en Esperanto, diversajn interesaĵojn, ekz. bildojn, desegnaĵojn, presitaĵojn, kartoĝi. (Estaseble havigispecialan tarifon je la poŝto por tiaj pakaĵoj.)
- (2) Kiam la lerneĝanoj mem uzas Esperanton kaj deziras sendi personajn leterojn. Oni ankau povas sendi tian pakaĵon laŭ speciala tarifo (laŭ tiu por komercaj paperoj), kondiĉe ke la

interŝanĝo estas farita pere de la lernejestroj, kiuj devas subskribi kaj enlistigi la enhavon.

Estas necese sekvi la jenajn kondiĉojn :—

- (1) Skribu al F-ino E. W. Tegg, 258 Victoria Road, RUISLIP (Mdx), Anglujo, informante pri (a) la aĝo de la klaso (meze), sekso, kaj, se ili deziras uzi Esperanton individue, la lingvo-nivelo, kaj (b) kun kiuj landoj vi deziras interrilatiĝi.
- (2) Ne komencu la interŝanĝojn sen pripensado, precipe pri la tempo de la restado ĉe lernejo. Ofte estas neeble, ke la lernantoj faru ion sen la helpo de la instruisto, kaj se ili baldaŭ forlasos la lernejon, la aranĝo fuŝiĝos. Pli bone do komencu je la aĝo, kiam oni povas esti certa, ke la korespondado daŭros dum pli ol unu jaro.
- (3) Enmetu unu respondkuponon internacian ĝuste stampitan, por ke vi ricevu respondon kun adresoj, sed **ne atendu tujan respondon**. Tempo estas necesa por havigi sufiĉe da adresoj, kaj se vi ne ricevus rapidan respondon, tio signifas, ke ne estas sufiĉe da taŭgaj adresoj por vi je tiu dato.

V.C.N.

(Landaj gazetoj bonvolu represi.)

S-ro Trygve Lie estas amiko de Esperanto

EN la Kongreso de Oslo la Esperanto-Asocion de Nord-Ameriko reprezentis D-ro F. W. Breth, kiu faris la sekvantan paroladeton :

“Mi havas la honoron reprezenti la usonajn Esperantistojn en ĉi tiu kongreso kaj transdoni al vi iliajn salutojn. Bedaŭrinde en nia lando ne estas multaj Esperantistoj : tio estas fakto, ĉar angle-parolantaj personoj ne konsideras la lernadon de helplingvo necesa. Ni multe laboras, por ŝanĝi tiun vidpunkton. Nenie oni pli forte sentas la necesecon de komuna lingvo ol en la Unuigitaj Nacioj, kies kunvenoj okazas en nia urbo New York. Aŭskulti paroladojn per kap-aŭskultilo estas primitiva metodo, kiu multe malhelpas la interkomprenon inter la membroj de la Unuigitaj Nacioj. Ni esperas, ke en ne malproksima estonteco la saĝaj personoj, kiuj partoprenas en tiu forumo, vidos la lumon kaj akceptos Esperanton kiel unu el la oficialaj lingvoj. Efektivigi tion estas la plej grava tasko de nia asocio.”

Tiuj vortoj ankoraŭ ĉirkaŭiris en la kapo de nia reprezentanto, kiam, hejmenflugante de Stockholm al New York, D-ro Breth vidis S-ron Trygve Lie, Ĝeneralan Sekretarion de la Unuigitaj Nacioj, eniri la aeroplanon en Oslo. Tio ŝajnis al li preskaŭ providenca hazardo. Jen eksterordinara okazo por diri kelkajn utilajn vortojn pri Esperanto. S-ro Lie sendube estas la plej eminenta norvego nun vivanta ; sed, kiel ĉiuj grandaj homoj, li estas afabla, kaj, kiam nia reprezentanto petis permeson paroli kun li dum iom da tempo, li plezure konsentis.

D-ro Breth montris per la fingro al sia verda stelo kaj diris al S-ro Lie : “Jen la temo, pri kiu mi deziras paroli kun vi.” S-ro Lie tuj rekonis la insignon kaj diris, ke li estas bone informita pri Esperanto, ke ĝia ideo estas kapabla pliproksimigi la naciojn unu al la alia, kaj ke tial ĝi posedas lian plenan simpatian. Kiam nia reprezentanto demandis, kia estas la ŝanco, ke la Unuigitaj Nacioj akceptos Esperanton, S-ro Lie respondis, ke ni devas esti paciencaj, ĉar la homaro malrapide akceptas novajn ideojn. Li diris, ke li persone favoras ĝin, ne nur kiel Ĝenerala Sekretario de la Unuigitaj Nacioj, sed ankaŭ kiel norvego.

S-ro Lie estas politika kaj diplomata eminentulo kaj tial devas esprimi siajn opiniojn singarde ; sed la fakto, ke li simpatias al nia movado, devus multe kuraĝigi nin.

(La anglalingva teksto de ĉi tiu artikolo aperis en *Amerika Esperantisto*. Antaŭ ĝia publikigo D-ro Breth submetis ĝin al S-ro Trygve Lie, kiu aprobis ĝin kaj permesis ĝian publikigon).



Tra la Mondo Esperantista



La Jubilea Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT)

622 laboristaj esperantistoj el 11 landoj ĉeestis en Düsseldorf (Germanujo) la 25-an kongreson de SAT. Pli granda estis la nombro da aliĝintoj (760 el 16 landoj), sed evidente por pluraj el tiuj ekzistis financaj malhelpoj. Krome el la membroj en la popoldemokratiaj landoj eĉ ne unu aliĝis.

La kongreso okazis en la feste aspektanta salonego de la "Rheinhalle", kie ĉe preskaŭ ĉiuj kunsidoj kaj kunvenoj ĉeestis multnombra publiko. Post la interkonatiĝa kunesto je sabatvespero, komenciĝis la kongreso dimanĉmatene per solena malferma kunveno, en kiu salutis la kongresanojn i.a. la ĉefurbestro, sinjoro Gocklen, kiu akcentis, ke kompreni kaj per tio ekkoni unu la alian estas grava kondiĉo por atingi mondan pacon kaj ke Esperanto povas grave helpi al tio.

La jarraporto de la estraroj kaj tiuj de aliaj asociaj instancoj ne kaŭzis multan diskutadon. La unuan komentis N. Bartelmes, kiu i.a. klarigis, ke la laŭkvanta malprogreson de la asocio kaŭzis membroperdo en postferkurtenaj landoj.

Grava parto de la kongresa programo konsistis el prelegoj. Paroladis N. Bartelmes (Düsseldorf-Parizo) pri *Heinrich Heine, sennacieca poeto kaj profeto*, Magnus Jacobsen (Aarhus) pri *Evoluo kaj taskoj de la*

Dana Laboristkleriga Asocio, Prof. Laurat (Parizo) pri *De Libera al organizita kapitalismo (Schuman-plano)*, A. v. d. Starre (Nederlando) pri *Bellamy-movado*, Mark Starr (Nov-Jorko) pri *Komparo de laborist-movadoj en Usono kaj Eŭropo* kaj Prof. Waringhien (Parizo) pri *Kion nekredanto povas trovi en la Biblio*. Krome okazis interdiskutado pri la temo *Militpreparado kaj kontraŭagado*, kiun enkondukis G. Dejardin (Parizo) kaj en kiu multaj partoprenis.

Kiel kutime kunvenis aparte instruistoj, tipografistoj, naturamikoj kaj aliaj fakgrupoj por priparoli speciale fakajn aferojn.

Varietea vespero, ekskurso al la kastelo Burg apud Solingen, tuttaga rejnveturo al Königswinter, vizitoj al kelkaj fabrikoj kaj institucioj konsistigis la ceteran parton de ĉi tiu bonsukcesinta kongreso.

Sekvontan jaron oni verŝajne kongresos en urbeto proksime al Sheffield (Anglujo).

La Fremdultrafika Societo Düsseldorf servis la kongresanojn per bela, ilustrita, 16-paĝa esperantlingva gvidilo pri sia urbo.

La kongreso akceptis gvidrezolucion per kiu ĝi i.a.

atentigis pri tio, ke la politika konflikto inter la oriento kaj la okcidento perdigis al SAT gravan parton de ĝia agadkampo,

sendis kuraĝigajn salutojn al tiuj, kiuj pro tio devis ĉesigi la kontakton kun la asocio, kaj

instigis al intensa varbado en aliaj landoj, kie ne ekzistas malhelpoj, por tiel kompensi la membroperdojn en la supre aluditaj landoj.

Ĉeestinto.

La 8-a Internacia Junularkunveno de T.J.O.

En la bele situanta dana vilaĝo Ry okazis je 10-17 aŭgusto la 8-a kunveno de T.J.O. Ĉeestis 110 el 10 landoj. Okazis ekskursoj al vidindaj lokoj en la ĉirkaŭaĵo, ŝipekskurso sur la lagoj al Silkeborg, al Aarhus, kie oni vizitis kooperajn fabrikojn, la malnovan urbon, la universitaton kaj la memorparkon, kaj kie la vicurbestro esperantlingve bonvenigis la kongresantojn.

Dum la bone ĉeestata jarkunsido reelektiĝis Tammo Kanter, prezidanto (Nederlando), Geert de Vries, kasisto (Nederlando), kaj la asesoroj Kurt Meyer (Germanujo) kaj Michel Duc Goninaz (Francujo). Asesorino fariĝis F-ino Helmi Veldhuyzen, kiu pro transloĝiĝo al Anglujo ne plu povas funkcii kiel sekretario. Al la prezidanto oni komisiis serĉi anstataŭanton. Provizore li mem funkcios kiel sek. — T. Kanter, Lombokstraat 2, Leeuwarden, Nederlando. La novprojektitaj Ĝenerala kaj Kongresa Regularoj kun etaj ŝanĝoj estas akceptitaj. Tiurilate oni notu, ke de 1 septembro ĉiu landa esperantista junularasocio, kiu konsentas pri celo kaj karaktero de la organizaĵo, povas membrigi sian anaron kolektive. Por lokaj kaj regionaj esperantistaj junulargrupoj de minimume 15 membroj validas la samo, se tutlanda organizaĵo ne ekzistas aŭ ne aliĝas.

Post vigla diskuto oni decidis ŝanĝi la nomon T.J.O. al T.E.J.O. (Tut-

monda Esperanto-Junular-Organizo) por pli utile propagandi en ne-esperantistaj rondoj.

Vaste oni priparolis la diskonigon kaj popularecon de T.E.J.O. inter la esperantista junularo. Rezulte de tio fondiĝis propaganda fako, ĝenerale direktota de asesoro. Flugfolio estas eldonota, kaj la organo *La Juna Vivo* reviziigis: i.a. sciigoj kaj okazintaĵoj en la esperanta mondo kaj pli da raportoj pri la stato kaj faroj de landaj junularmovadoj estas publikigitaj laŭ la spaco disponebla.

La venontjara kongreso estas planita en Aŭstrujo—se eble, en Kufstein.

Entute la Kongreso bone sukcesis. La lingva nivelo estis pli alta, la fakkunsido fruktodona, la ekskursoj neforgeseblaj, dum la internacia balo kaj la festvesperoj kun eminentaj aktoroj longe restos en la memoro!

T.K.

La Feriaj Kursoj en Helsingør, Danlando, je 25/7—1/8

CI tiun jaron mi decidis partopreni en la Esperanto-kursoj ĉe la Internacia Altlernejo en Helsingør, Danlando. Mi pasigis nur ses tagojn tie, kaj tamen mi revenis kun amaso da rememoraĵoj de plej diversaj specoj.

Unue mi menciuj la elstaran organiz-kapablon de S-ro Friis, kiu bonege prizorgis ĉion, vizitis la tri manĝoĉambrojn post ĉiu manĝo por fari anoncojn, eĉ por persone liveri la alvenintajn leterojn; ankaŭ la kasiston, S-ron P. Jørgensen, kiu multege laboris; kaj la tre afablan direktoron de la tuta altlernejo, S-ron Lennings, kiu tre simpatias al Esperanto.

Matene: tri studperiodoj, sed neniel severaj. S-ino Major el



de maldekstre :

S-ino M. C. Major,
Londono,

F-ino Ida Christensen,
Kopenhago,

S-ro Tiberiu Morariu,
Stokholmo,

F-ino M. Noll,
Kopenhago,

F-ino Inge Mortensen,
Fredericia.

Londono kaj F-ino Ida Christensen el Kopenhago celis paroligi la progresintojn kaj tion gaje faris. S-ro Tiberiu Morariu el Stokholmo havis grandan lernantaron pri la instruaro laŭ la fama Ĉe-metodo; allogis ilin ne nur la temo, sed ankaŭ la gaja kantado, la sprita ŝercado kaj la amuzaj rakontoj de la Italo, S-ro Lovati el Milano.

Posttagmeze: ekskursoj al belegaj kasteloj. En unu sunbrila tago (ja ofte pluvis!) vizito al la ĉarma Sveda urbo, Hälsingborg, atingata per mallonga pramveturo el Helsingør. La Svedaj geamikoj bonege aranĝis ĉion: rondveturon en omnibusoj; supreniron de la kastela turo kun vasta elrigardo; viziton al belega, moderna koncertejo, kie Esperantistoj pianludis kaj kantis por provi la akustikon.

Prelegoj de F-ino Noll (Kopenhago), S-ro C. C. Goldsmith, Kaplano L. Thalmaier (Munkeno), ĉiuj famaj en nia movado, aldonis al la intereso.

Amuzaj prezentadoj de teatraĵoj de grupoj el Germanujo kaj Britujo, belega kantado de la Bristola ĥoro,

treege plaĉaj Svedaj popoldancoj de vizitanta Sveda trupo el Hälsingborg en naciaj kostumoj kun posta partopreno por ĉiuj distris la ĉeestantojn. Multaj dancoj kaj amuzaĵoj estis bonhumore gviditaj de Ken Alexander (redaktoro de *The British Esperantist*). Tre amika kunveno okazis inter precipe Hanoveraj kaj Bristolaj gesamideanoj, kiam la Britoj instruis Anglajn popoldancojn al la Germanoj, kiuj mirinde sukcesis.

Estis belega ludado sur piano, violono k.t.p. de F-ino Trislev (Aarhus), Gordon Watson (Bristol) kaj aliaj: ĉiam forta komuna kantado el internacia kantlibro: nokte, vizitoj al la "Casino" por danci; kaj ĉiam renkontiĝoj kun homoj el dek-kvin landoj, komencantoj, spertuloj; senĉesa fotografado, babilado, amikiĝo. Ne estis eble en ses tagoj persone paroli kun ĉiuj 219 partoprenantoj!

Ĉu la suno bele brilis la tutan semajnon? Tute ne! Sed ĉu ni estis malgajaj? Tute ne! Oni

aranĝis koncerton aŭ prelegon, kaj forĝesis pri la pluvo !

Kiam venis la fino, ni ĉiuj ĝojis, ke ni pasigis tiel belan semajnon en Esperantujo, kaj laŭ la tradicio ni elkore kantis la Skotan kanton :

*“Pasintaj tagoj ne revenos,
Sed memoros ni !”*

S. V. Reed.

Aŭstrujo

Dua Esperanto-Placo—Kiu sekvos ĝin ? Okaze de la 3-a postmilita Esperanto-Kongreso Aŭstra en Graz, Stirio, placo ricevis la nomon *Esperanto-Platz*.

Gratulon al niaj Stiriaj kunbatalantoj.

Britujo

La 37-a Brita Kongreso okazos en Bournemouth dum Pentekosto 1953. Multaj homoj en la mondo jam scias (pro la tiea U.K. en 1949), ke Bournemouth estas unu el la plej ĉarmaj kaj bonvenigaj urboj en Britujo. La LKK jam firme metis la fundamentojn de ĝuinda ferio. Jam ekzistas longa listo de eminentaj patronoj, plejparte ne Esperantistoj, i.a. Lia Moŝto la Duko de Wellington, Lordo Leŭtenanto de la provinco Hampshire.

La LKK ankaŭ anoncas jene :
amasrestejo por junuloj (oni precipe bonvenigos ilin),
je vendredo 22 majo okazos la ceremonia akcepto kaj granda balo, oni petu informojn de S-ino Laurie, 6 Marlborough Road, BOURNEMOUTH (Hants.)

Hispanujo

La XIII-a landa Kongreso de Esperanto—la dua postmilita—donis novan sukceson al niaj Iberiaj

samideanoj. Ĝin anoncis bunta kaj arta afiŝo fiksita en diversaj lokoj de la kongresurbo Valencia, kie la organizantoj preparis aranĝon grandstilan (kaj sendeficitan !), laŭ la klasika tradicio. Belaspekta kongreslibro, membrokarto, insigno, k.t.p. promesis multon al la 250 ĉeestantoj, kaj certe neniun seniluziigis ! Fakte, tiu manifestacio ŝajnis internacia, ĉar delegitoj de ok landoj salutis la kongresanojn, kiujn ankaŭ akceptis solene la urbestro, en pompa ĉambro de la urbdomo. Meson kun elokventa prediko de pastro Casanovas, en la katedrala kapelo de S-ta Kaliko, sekvis riĉa bankedo kun regalado per aŭtentika ĉampano *Verda Stelo* kaj Literatura Festo, kie deklamoj alternis kun kantoj kaj juĝoproklamo de la ĵus okazinta “literatura konkurso”.

Ni menciuj ankaŭ la laborkunsidojn (oni preparas i.a. plenan vortaron hispana-esperantan), la dekminutan intervjuon ĉe la nacia Radio-Valencia, la afablan saluttelegramon de la ŝtatestro, generalísimo Franco, kaj la ĉarman ekskurson al la Lago Albufera kaj marbordo. Tiu kvartaga evento akcentis plian fojon la seriozecon de la hispanaj esperantistoj (kiuj majstras tre fluan esperanton), la dinamismon, kiu vigligas ilin (partopreno de multaj junaj homoj), la amplekson de la movado en- kaj ekster-organiza, la amon al nia lingvo (kiel pruvas ekzemple la belega brodita standardo de Chestre, la esperantema urbeto), kaj—nelaste—la ĝentilan gastigemon de la Valencianoj ! Unuvorte, ateston pri respekto al nia afero kaj batalado kontraŭ gravaj malhelpoj ĉiuspecaj.

La venontjara kongresurbo estos kredeble Bilbao.

R. Zollinger, Svislando.

Nov-Zelando

Auckland — Pli ol 60 personoj partoprenas Ĉe-kurson, kiun gvidas D-ro J. Hamvai. La Laborista Eduka Asocio aranĝis la kurson. La Esperanto-Societo de Auckland kreskas kontentige.

La 18-a Kongreso de N.Z.E.A. okazos en Auckland je 29 decembro 1952–2 januaro 1953. Bonvolu sendi salutojn al la Kongres-Sekretario, 33 Muripara Avenue, Pt. Chevalier, Auckland W.3, Nov-Zelando.

Usono

EANA-Kongreso en Sacramento — La 42-a Kongreso de la Esperanto-Asocio de Nord-Ameriko okazis en Sacramento, la ĉefurbo de Kalifornio, je 27-30 junio. Salutparolis la urbestro kaj la meksika konsulo: la kanada ĉefkonsulo sendis salutleteron. 15-minutan radio-programon pri Esperanto kaj la kongreso partoprenis Senatano H. E. Dillinger, membro de la kalifornia parlamento kaj Prezidanto de la Esperanto-Klubo de Sacramento, D-ro William Solzbacher, Prezidanto de EANA, kaj S-ino Doris T. Connor, Helpa Sekretariino de EANA. Dum bankedo paroladis S-ro Joseph Scherer, Akademiano kaj Esperantista mondvojaĝinto, kaj S-ino Patricia de Cleene, mondvojaĝinto, el Novzelando. Laŭ la raportoj laŭtlegitaj EANA nun havas iom pli ol 800 membrojn. Enspezoj kaj elspezoj dum la pasinta jaro estis proks. 8.000 dolaroj. La Kongresanoj faris ekskurson al Coloma, centro de la orminada regiono. Maljuna orserĉanto demonstraciis al la Esperantistoj, kiamaniere oni "lavas" la oron el la sablo de la rivero, sed neniu kongresano trovis oron por solvi la

financajn problemojn de la Esperantomovado. La venontjara kongreso okazos en Orienta Usono, eble en la urbo New York.

W.S.

Esperanto en Lernejoj por Plenkreskuloj — Lastatempe ne malmultaj lernejoj enmetis Esperanton en siajn studprogramojn. Inter ili estas pluraj en la ŝtato New Jersey, Westside High School en Newark, kaj tiuj en South Orange, Maplewood kaj Chatham-Madison.

Dum Ŝtata Konferenco de la Lernejoj por Plenkreskuloj en la fama universitata urbo Princeton okazis Esperanto-ekspozicio organizita de la lokaj Esperantistoj kun helpo de EANA. La Esperanto-Asocio de New Jersey oficiale aliĝis al la Ŝtata Asocio de Lernejoj por Plenkreskuloj.

Eŭropa armeo

kaj la lingva problemo

Samideanoj kiuj interesiĝas pri la lingva problemo en la Eŭropa Armeo kaj pri la utiligo de Esperanto (profesiaj aŭ rezervaj militistoj) estas petataj skribi al franca rezerva oficiro kiu okupiĝas pri tiu ĉi problemo: Monsieur Léon Agourtine, S.P. 50.368—B.P.M. 600 (Francujo).

Kun la nuna numero
ni sendas repagilon
(al nepagintoj por 1953)
por simpligi la realiĝon

**BONVOLE
AGU NUN**

R. Watier :

La Unua Somera Restado en Kastelo de Gresillon (Bauge, Francujo)

ANTAŬ unu jaro en Francujo aperis la plano por aĉeto de bieno uzota por internaciaj someraj renkontiĝoj kaj kursoj. Multaj klopodoj devis esti faritaj de landa Asocio kaj de la franca grupo de instruistoj. La ĝenerala Sekretario de tiu lasta grupo S-ro MICARD estis la iniciatinto de la tuta afero. Kolekti plurajn milionojn da fr. frankoj, trovi taŭgan domegon en agrabla regiono favora por turismo ne estis facila tasko. Tamen la energio de S-ro Philippe, Prezidanto de U.E.F. kaj de S-ro Micard, ilia sperto kune kun tiu de diversaj sindonemuloj venkis ĉiujn barojn.

La 14an de Julio 1952 malfermiĝis en Bauge, inter Bretonujo kaj la bela Loire-regiono, la Esperantista Kulturdomo situanta en la Kastelo kaj bieno de Grésillon*. Laŭ antaŭvidita plano, la laboro komenciĝis. Tri sinsekvaj restadtempoj okazis: Somera elementa kurso (3 semajnoj) — Akcelitaj kursoj unua kaj dua gradaj (2 semajnoj) — kaj la tiel nomita periodo "Seminario", tio estas kultura kaj eduka internacia tempo (2 semajnoj). En Septembro estis libera tempo por feriantaj samideanoj.

Kvankam la instalado de la kastelo postulis longan tempon de Januaro ĝis Junio kaj ne ebligis la reklamon en frua tempo, la partoprenantoj venis en granda nombro (ĉirkaŭ 150). Dum la du unuaj someraj kursoj venis multaj gejunuloj kiuj ne nur lernis la lingvon aŭ perfektigis sed

ankaŭ bone amuziĝis kaj ĝuis la agrablaĵojn de la Kastelo: la belan parkon kun ĝia rivereto kaj lageto, la sportterenon por pilkĵetludoj, la ekskursojn al Kasteloj de Loire kaj ĝis la marinsulo Noirmoutiers, ankaŭ la amuzajn vesperojn en la Kastelo mem: dancoj, ludoj, sonfilmoj.

Dum la tria periodo la ĝenerala aspekto de la ĉeestantaro estis iom pli serioza. La tempo estis dividita jene: matene: debato aŭ prelego ĝis la 10 $\frac{1}{2}$ h., poste de la 11h. ĝis tagmanĝo: gramatikaj lecionoj aŭ lingvaj demandoj gviditaj de S-ro Profesoro Baronnet. Posttagmeze estis kurso por 12 geknaboj de la urbo Bauge. Samtempa la anoj de tiu studtempo ĉeestis la kurson montritan al ili kiel modelon de la t.n. "Miksa Kurso" uzota por kursoj en la tuta lando. Ĝi estas rektmetoda kurso kun enmikso de franclingvaj klarigoj dum la lastaj lecionoj. Vespere okazis prelegoj, dancadoj kaj kino-prezentoj.

Inter la prelegoj, ni menciuj:

Profesoro Baronnet: (1) *Kon-Tiki*: parola recenzo, klarigoj pri la fama libro.

(2) *Evoluado de la lingvo*. Modernaj tendencoj.

F-ino Dedieu: *Pri la Universala Kongreso en OSLO*.

Inĝeniero Watier: (1) *Eminentuloj kaj memoraĵoj el la "Ekflora Epoko" 1900-1909*, kun lumbildoj.

(2) *Teknika kaj Socia progreso en moderna entrepreno*, kun lumbildoj.

* Bildo aperis en nia marta numero, p. 68.

D-ro Wegener : *Pri la Arto fariĝi centjara* (medicinaj konsiloj por konservo de la sano).

S-ro De Waard : *Pri Finnlando* (personaj memoraĵoj humure rakontitaj).

La Debatoj havis jenajn temojn :

- (1) Pri la Movado en frua epoko kaj nuntempe.
- (2) La Asocio Laboro-Kapitalo (laŭ objektiva ekonomia vidpunkto).
- (3) Lingvaj demandoj.
- (4) Pri someraj lernejoj—la organizo.

* * *

La 31an de Aŭgusto okazis la oficiala inaŭguro de la Kulturdomo.

Posttagmeze, en la parko de la kastelo svarmis ĉirkaŭ 500 personoj : venis scivblemuloj el la regiono de Baugé, venis samideanoj el ANGERS, NANTES, LE MANS, PARIS k.t.p., venis oficialaj personoj : Sub-prefekto de la departemento Maine & Loire, Ĝeneralaj Konsilantoj, Urbestroj el najbaraj urboj, reprezentantoj de diversaj klerigaj aŭ kulturaj Asocioj, Skoltoj, Aŭtomobil-Klubo, k.t.p. . . .

La ceremonio okazis tute glate kaj plensukcese. La Sub-Prefekto tranĉis la simbolan rubandon kiu baris la

ĉefpordon de la kastelo, poste estis prelegoj de : S-ro Fouski, Prezidanto de la Grupo de Angers, kaj organizanto de la ceremonio, de S-ro Philippe, Honora Prezidanto de la Kulturdomo, de S-ro Eschenbrenner kaj fine de S-ro Bernard, Sub-Prefekto kiu faris tre favoran alparolon.

Oni vizitis en la kastelo bele aranĝitajn ekspoziciojn de Infanaj Desegnaĵoj kaj de Esp. literaturo. Fine okazis por la tuta publiko varietea prezento kun partopreno de la junaj lernantinoj de la kurso de S-ro Odent.

La ŝtata radio-stacio "Rennes-Bretagne" sendis aŭtomobilon kun registraj aparatoj. Tiel la eĥoj de la festo povis esti elsenditaj al la tuta okcidenta parto de Francujo. Tri regionaj gazetoj : Ouest-France (eldonnumero 250.000), Courrier de l'Ouest (eld. numero : 80.000) kaj La Nouvelle République detale raportis pri la inaŭguro. Jam antaŭe ili estis presintaj tre favorajn artikolojn.

Sume la Inaŭguro bonege impresis en la regiono. La samideanoj kiuj partoprenis kaj la restadtempojn kaj la inaŭguron certe revenis hejmen kun plena fido por la estonto de la Kulturdomo.

LA SUDA STELO

Oficiala organo de Jugoslavia Esperanto-Federacio

Landaj informoj, literaturo, interesaj artikoloj

Dumonate : jarabono 7 ŝil. 3 pencoj

Mendebla ĉe U.E.A.

La Signifo de Niaj Kongresoj

**Resumo de la Festparolado de Prof. I. Lapenna
okaze de la 37-a Universala Kongreso en Oslo.**

LA oratoro akcentis la gravecon de la fakto, ke la unuan fojon en la historio de la Esperanto-movado ni kongresas en la ĉefurbo de la norvega nacio. Li menciis la geniojn de la penso, kiaj Ibsen, Grieg, Vigeland, kiujn donis tiu ĉi malgranda popolo al la tutmonda kulturo kaj esprimis la dankon de la Esperantistaro pro la sekvinda ekzemplo de p a c e m o , kiun prezentas la skandinaviaj popoloj al la homaro.

Poste, doninte trafan ekzemplon pri la forĵeto de novaj sciencaj veroj fare de la samtempaj oficialaj reprezentantoj de la kultura vivo, li daŭrigis :

“Ni ne estas ia obskura sekto ; ni ne havas iajn mistikajn sekretojn. Aperte kaj sincere ni montras al ĉiuj, kiuj havas la orelojn por aŭdi kaj la okulojn por vidi, la praktikan valoron de Esperanto, ĝian kulturan signifon, ĝian idean rolon.

“La ordinaraĵoj sen antaŭjuĝoj vidas la fakton kaj tute simple akceptas ĝin kiel realaĵon. La kompetentaj instancoj de la scienco, edukado kaj kulturo venas kelkfoje al ni, admiras la aferon, sed post kelkaj tagoj daŭrigas aserti, ke la Internacia Lingvo estas neebla, ke ĝi apenaŭ taŭgas por interkompreniĝo, ke ĝi ne havas literaturon, ke ĝi estas en la plej bona okazo modesta surogato de lingvo.

“Nia 37-a Universala Kongreso estas nova ero en la longa ĉeno de potencaj pruvoj pri la senfinaj eblecoj de la Internacia Lingvo, pri ĝia perfekta taŭgeco por ĉiuj sferoj de la internacia vivo. En tio konsistas la

unua signifo—la signifo manifestacia—de nia kongreso.

“Estus tamen grandega eraro pensi, ke per tio elĉerpiĝas ĝia rolo !

“Ŝajnas al mi, ke jam delonge forpasis la tempo, kiam ni tradukadis la verkojn de Homero aŭ Vergilo, tiujn de Shakespeare aŭ de Dante, tiujn de Ibsen, de Dickens, de Lagerlöf kaj de multaj aliaj nur por ‘pruvi’ al la ŝkeptikuloj la valoron de Esperanto kiel nuancita esprimilo de la plej profundaj pensoj kaj plej delikataj sentoj. Ŝajnas al mi, ke forpasis ankaŭ la tempo, kiam ni kunvenadis en kongresoj, en diversaj fakaj kaj specialaj internaciaj konferencoj nur aŭ ĉefe por montri al la mondo, ke ni ekzistas.

“Ne ! Vere, hodiaŭ ni evoluigas nian literaturon, ni posedas nian gazetaron, ni havas niajn radio-elsendojn, ni kreis kaj perfektigas nian potencon sistemon de praktikaj internaciaj servoj ne plu, aŭ almenaŭ ne ĉefe por pruvadi al la strutoj kun la kapo en la sablo, ke la ideo de komuna lingvo jam realiĝis pere de nia Esperanto, sed ĉion ĉi ni faras unue kaj antaŭ ĉio, ĉar ni mem volas utiligi kaj intelektu kaj morale, kaj ideo kaj praktike, ĝis la plej alta grado la sennombrajn avantaĝojn, kiujn prezentas la Internacia Lingvo por ni ĉiuj. Tion ni atingas ankaŭ pere de niaj kongresoj. Tial, en la nuna stadio de la Esperanto-movado, la ĉefa celo de niaj kongresoj estas pridiskuti la komunajn problemojn, riĉiĝi je la spertoj de la aliaj kaj riĉigi ilin per niaj propraj spertoj, serĉi kaj trovi la vojojn de ankoraŭ

pli granda utiligo de la lingvo. Tiu labora aspekto de nia kongreso estas samtempe ĝia dua signifo.”

Prof. Lapenna faris aludon al la olimpiaj ludoj, en kiuj la junularo de diversaj nacioj mezuras siajn fizikajn fortojn, sed en kiuj, malgraŭ la kunestado, ili estas surdaj kaj mutaj unuaj al aliaj. Li daŭrigis:

“La antikvaj Grekoj ne havis nur konkursojn de atletoj. Kunvenadis tie ankaŭ poetoj, kiuj mezuradis siajn artajn esprimkapablojn kaj intelektajn fortojn. Ĉi tie en Oslo ni daŭrigas—provizore en modesta, kerna formo—tiun ĉi aspekton de la klasikaj grekaj tradicioj. Ĉi tie niaj poetoj kaj verkistoj, niaj junaj oratoroj partoprenas en konkursoj multe pli noblaj, en konkursoj belartaj kaj parolartaj. Ĉi tie sciencistoj de diversaj nacioj popularigas la akiraĵojn de la scienco. Ĉi tie niaj plej kompetentaj norvegaj geamikoj prezentas al reprezentantoj de multaj popoloj la kulturon, la kutimojn, la historion de sia nacio. Kaj—same kiel en antikva Greklando tio okazadis en lingvo komuna al ĉiuj grekaj gentoj—ĉio ĉi okazas en lingvo neŭtrala, kiu estas propraĵo de neniu aparta popolo, sed trezoro de ĉiuj, havaĵo de la tuta mondo!

“Tiamaniere ankaŭ pere de niaj kongresoj ni ĉiam pli kaj pli reale kontribuas al pli bona internacia kompreniĝo. Ankaŭ pere de niaj kongresoj—same kiel per la aliaj kulturaj manifestiĝoj—ni kreas belegan mozaikon, kies ŝtonetoj konsistas el la plej valoraj perloj, kiujn kreis la homa spirito, tute egale al kiu raso, nacio aŭ religio la individua aŭtoro apartenis aŭ apartenas.

“En tio konsistas la tria, la kultura signifo de niaj kongresoj.”

La oratoro finis sian paroladon per jenaj vortoj:

“Post kelkaj momentoj ni ĉiuj ekstaros kaj ankoraŭfoje aŭdiĝos la vortoj kaj sonoj de himno, kiu alvokas ‘ne al glavo sangon soifanta’, sed al toleremo, konkordo, harmonio, paco. Kiam ni ripetos—jam la centan, jam la milan fojon—la alte noblajn pensojn de D-ro Zamenhof, entenitajn en *La Espero*, ni ne faru tion aŭtomate, sed ni enpensiĝu profunde en ilian signifon kaj ni ĵuru en ni mem, ke—malgraŭ la obstakloj, malgraŭ la persekutoj, malgraŭ ĉiaspecaj malfacilaĵoj—ni senlace daŭrigos lian verkon ĝis plene realiĝos lia revo: unu mondo, unu homaro, unu komuna internacia lingvo por ĉiuj homoj!”

Ankoraŭ pri Oslo

Miskompreno! Oni atentigis nin, ke la bildo sur paĝo 230 de la Septembra numero kaŭzis miskomprenon. S-ro C. Støp-Bowitz, la Prezidanto de la LKK en Oslo, estas tie montrita sen jaketo. Ni deziras klarigi, ke oni faris tiun foton **ne** dum la Solena Inaŭguro (kiam kompreneble oni estas pli formale vestita—vidu la bildon sur paĝo 227)

sed eĉ antaŭ ol la Kongreso okazis.

La Estraro de ILEI (korekto al p. 231), kiun oni elektis dum la Kongreso, konsistas el la jenaj personoj: Prezidanto, F-ino V. C. Nixon; Vicprezidanto, F-ino J. Dedieu; Sekretario kaj Kasisto, S-ro Einar Dahl; kaj S-ro P. Korte (Nederlando) kaj S-ro K. Kröber (Germanujo).

Sigeo Matumoto :

Reformado de la japana skribsistemo

KIAM, komence de la dudeka jarcento, la rusa oficiro A. Postnikov renkontis la japanan verkiston Hasegawa, li instruis al Hasegawa la mondlingvon Esperanto, kaj tiu poste verkis la unuan japanlingvan Esperanto-lernolibron. Krom fari tion, Hasegawa ankaŭ faris reformon alte taksindan, t.e., li iniciatis verki siajn novelojn nur en la parola lingvo, kontraŭ tiama kutimo uzadi la literaturan skriban lingvon. Tio ja estis epokfara, kvankam tion rezultigis vere la mirinde akcela progresado kaj senfina importado de la brila eŭropa kulturo, sed ne alportis iun radikalan ŝanĝon, kaj tial ne plisimpligis la japanan lingvon. Ankoraŭ nesolvita restis certe pli grava problemo, pro kio suferis la japanoj jam delonge, kaj devas ĉion oferi ili, laŭeble. Tio estas la ortografio.

La japana lingvo konsistas el la simple prononceblaj fonemoj, ĉiu kun vokalo. Kontraŭe, por skribi ĝin, ni japanoj suferas je ĉiu paŝo. Skribante leterojn, artikolojn k.t.p. ni kutime devas uzi tri malsamajn skribsistemojn: la ĉinajn ideografiaĵojn, la hirakanan kaj katakanan signojn. Kiam ni legas ĵurnalojn, gazetojn kaj librojn ni renkontas la tri literarojn, kaj ofte ankaŭ latinajn literojn, do ni devas scii kvar skribsistemojn! Kiel ni estas riĉaj je diverseco de la literoj! Tamen ni ne povas ĝoji; male, ni suferas pro tio. Estas ne tre granda la tuta nombro de la tri signosistemoj. La ĉefa kaj plej malfacila temo estas la ĉinaj ideografiaĵoj. Ilia nombro estas tre granda, sume pli ol 40.000. En

ĉiutagaj ĵurnaloj ni renkontas tri mil ĝis kvar mil diversajn ĉinajn signojn. Kompreneble ili aperas ofte sur la sama paĝo. Tio malrapidigas skribadon kaj presadon. Iliaj formoj estas malfacile memorataj pro komplikeco, kaj facile forgesataj pro simileco. Por korekte uzi ilin ni devas konstante uzadi niajn cerbojn, sed malgraŭ tio ofte eraras skribante.

Ĉiu signo estas parolata almenaŭ laŭ du malsamaj manieroj, la ĉina kaj la japana. Plejmultaj signoj havas plurajn prononcojn: kelkaj eĉ pli ol kvindek sonojn. Tial ni ofte malkorekte legas ĉinajn signojn kaj tio kaŭzas mal-(aŭ mis-)komprenon. Inter eminentuloj troviĝas personoj kiuj ridinde malĝuste prononcas la signojn.

Ĉar multaj signoj havas saman sonon, ni trovas grandan amason da homonimoj. Tiel ekzemple la vortoj "kooŝo" kaj "seiŝi" havas ambaŭ 39 homonimojn, kaj "ŝooka" 38. Tiel longe kiel ni uzados la ĉinajn signojn, pli kaj pli multobliĝos tiuj maloportunaĵoj. La plej bona rimedo estas uzi nur fonetikajn sistemojn, kaj tiel ni skribus nur tiajn vortojn, kiajn ni facile komprenus interparolante.

Antaŭ kelkaj jaroj la Ministrejo de Edukado limigis uzadon de oficialaj ĉinaj literoj al 1850, kaj la registaro proklamis malakcepton de personaj nomoj de novnaskitoj nomitaj per neoficialigitaj ĉinaj literoj. De tiam leviĝis protestoj de konservativaj gepatroj. Tio montras ke la japanoj obstine ŝatas la antikvan ideografion. Kaj estas bedaŭrinde por ili, ke la gelernantoj estas devigataj lerni nur

881¹ ĉinajn literojn dum naŭ jaroj ! Kiel ili povus libere legi ĵurnalojn ? Do sciu, tio signifas ke ni devas lerni literojn dum la tuta vivo.

La komplikeco de skribsistemoj en la japana lingvo kaŭzas diversajn malfacilaĵojn ne nur por edukado, sed ankaŭ por korespondado, presado kaj maŝinskribado, kaj ĉiutage dum la tuta vivo ni japanoj devas en legado kaj skribado sperti nemezureblajn neefikecon kaj maloportunaĵojn. Tre ofte ni devas konsulti vortaron nacilingvan por lerni aŭ memori la formon kaj prononcon de bezonataj ĉinaj literoj. Por ion komposti oni devas serĉi aparte ĉiun necesan presliteron, kio postulas multjaran sperton. Kvankam grandaj firmoj posedas tajpilojn por kanaoj kaj ĉinaj literoj, tamen skribado per ili ne estas pli rapida ol manskribado. Kiam la japanoj enkondukos ĝenerale latinajn literojn la unuan fojon ni povos havi ĉeĥejme skribmaŝinojn.

La komplikeco naskas konsekvence neperfektecon de la japana lingvo rilate esprimadon de la ideoj. Tion pruvas, ke ni ne havas unusolan ortografion, kiel eŭropaj lingvoj. Nur principe ni uzas la ĉinajn signojn por esprimi ĉefajn idevortojn, nome substantivojn kaj radikojn de verboj aŭ adjektivoj. Hirakana-literojn ni uzas por helpvortoj kaj finaĵoj, kaj katakana-literojn por fremdvortoj venintaj el la Okcidento.

Tia senbezona diferencigado de la koncepto laŭ skribsistemoj troŝargas niajn memorojn, kaj krome baras la ĝustan progreson de la nacilingvo. Ekzemple, kvankam ni skribas per ĉinaj signoj multajn homonimojn, multfoje ni ne povas per ili esprimi bonajn familiarajn parolvortojn, kaj tial en japana lingvo la distingo inter la skriba kaj parola lingvoj estas

nekompareble pli granda ol ĉe la eŭropaj lingvoj. Kaj tial estas necese baldaŭ efektivigi metamorfozon de ideografio en fonetikecon. Tamen ni ne povas tuj preni novajn sistemojn ĉar la afero iras multoble pli malrapide ol kiam la germana kaj turka lingvoj alprenis latinajn literojn. La ĉinaj signoj kaj literaro ludis la plej gravan rolon ne nur en la japana klasika literaturo sed ankaŭ en politiko, religio (budhismo kaj konfuciismo) kaj sciencoj dum pli ol mil jaroj. Kompreneble troviĝas multaj rutinaĵoj al kiuj la ĉinaj signoj ŝajnas tre necesaj kaj plej elstaraj. Aliflanke plimultaj estas tute indiferentaj pri la malfacilo kaj maloportuneco.

Ĉiukaze la merito de la ĉinaj signoj estas alte taksinda ĉar ili alportis esprimilojn kiujn la japanoj malhavis antaŭe, kaj ĉindevenaj vortoj okupas preskaŭ duonon de la japanlingva vortaro.

* * *

Abolinte uzadon de la ĉinaj signoj, kiun skribsistemon ni alprenu ? Prezentiĝus du solvoj, nome la kanaoj kaj latinaj literoj. Kvankam kanaoj estas artaj (plisimpligitaj el ĉinaj signoj) kaj dumlonge uzataj, kaj estas oportunaj por skribado kiel helpilo al la ĉinaj signoj, ili tamen ne utilas kiel unusola memstara sistemo. Tial ni konkludas ke restas nur unusola rimedo por solvi la problemon, t.e. latinaj literoj, de japanoj nomataj "rômazi".

Mallonge la historio de rômazi estas jena : en 1859 usona militisto Hepburn alveturis nian landon kaj poste publikigis la unuan fojon en japana lingvo "Enkonduko al Kristanismo" kaj "Vortaro angla-japana kaj japana-angla". Por tiuj libroj li uzis skribsistemon kiun li

ヒギンボータムの災難

Specimena japana skribaĵo

mem inventis. Laŭ lia nomo tiun manieron por rômazi-skribado ni nomas “Hebon-Siki” (=Hebon-sistemo), kiu sin distingas per transskribado de japanaj prononcoj laŭ la angla lingvo.

En 1885 Aikitu Tanakadate, akademiano, iniciatis Nippon-Siki (=Japana-sistemo) kiu pretendas sian superecon per akordiĝo kun konjugacioj kaj prononcaj reguloj de la lingvo. De 1910 aperas monata organo por tiu skribmaniero “Rômazi Sekai”.

Dum 1937 la ministraro decidis oficialigi Nippon-siki kun kelka ŝanĝo, post longa intensa diskutado. De tiam la skribmaniero nomiĝas Kunrei-siki (kabinet-ordona-Sistemo). Grandaj diferencoj estas ke Kunrei-siki apogis uzadon de majuskloj ĉe la kapo de substantivoj kaj anstataŭigis la fonemojn “di, du, wo, dya” k.t.p. per simplaj “zi, zu, o, zya”. Do inter Nippon-siki kaj Kunrei-siki ne estas granda diferenco.

Kvankam plejmultaj rômaziistoj pretendas superecon de Kunrei-siki, tamen jam plivastiĝas Hebon-siki (nun nomata Hyôzyun-siki) kaj laŭ natura inklino instruistoj kaj studentoj de anglalingvo kaj vortaro japana-angla ĝin praktikas. La nomoj de ĵurnaloj skribiĝas laŭ Hyôzyun-siki por servi al usonanoj. Ĉu ni tamen devas obei al skribmaniero kiu viktimitigas regulecon en esprimado de konjugacio kaj prononco de nia propra lingvo?

Diferenco inter Kunrei-siki kaj Hyôzyun-siki estas proks. 20% ĉefe:

ti=chi; tu=tsu; si=shi; zi=ji;
zya=ja; supersigno longvokala ^=';
n-m antaŭ la konsonantoj p, b.


Antaŭ kelkaj jaroj la elementaj lernejoj enkondukis instruadon de rômazi per legolibroj, sed malakordas pri la du sistemoj. La konkurado kaŭzas grandan maloportunecon kaj malhelpas akcelan disvastiĝon de rômazi inter la japanoj.

Kunrei-siki kaj Nippon-siki pli-malpli similas, dum Kunrei-siki kaj Hyôzyun-siki havas abismon ne nur de pasia* malakordo sed ankaŭ de teoria malsameco. Al mi ŝajnas ke io simila lingve en Esperanto estas la -ujo/-io afero. Unu defendas lingvan fundamenton, dum la alia akcentas tielnomatan internaciecon.

Fonetikigi la skribsistemon de japanlingvo donus grandan profiton ne nur al la japanoj mem, sed ankaŭ al alilandanoj kiuj volas studi la japanlingvon. Kaj tiam la japana lingvo ĉesos esti volapukaĵo antaŭ ĉiuj alilandanoj. Ankaŭ Esperanto ricevos grandan puŝon kiam la japanoj kutimos vidi latinliterojn kaj ĉesos adori fremdajn nacilingvojn.

Ĉiukaze devos esti granda ŝanĝo en nia kultura vivo. Enkondukado de latinliteroj estos post longe kaj plena de malhelpoj, sed ni nin dediĉas por la progreso de la tuta popolo. Nia devizo estas “*Kun japanoj per latinliteroj, kaj kun alilandanoj per Esperanto!*”

* Malgraŭ nekomprenebleco ni ne havis okazon kontroli ĉi tiun uzon. Povas esti, ke la aŭtoro volas diri “pasigrafia”.—Red.



Tra la Libraro

Duope ricevitaĵn verkojn ni recenzas ;
unuope ricevas nur mencion.

*=akireblaj ĉe U.E.A.

Recenzoj enhavas la proprajn opiniojn de la recenzintoj.

Ili ne necese estas laŭ la oficiala starpunkto de U.E.A.

***Esperanta Legolibro** kompilita de Elio Migliorini. 3-a eldono, plene reviziita kaj pligrandigita. Eld. A. Paolet, Italujo. 12 × 16.5 cm., 188 paĝoj, broŝ. 4ŝ. 6p., afranko 4p.

Jen legolibro, kiu konsistas plejparte el pecoj verkitaj de konataj aŭtoroj, kaj kiu estas pro tio pli alloga al la serioza studanto ol la kutima anekdotaro. Ja troviĝas anekdotoj, sed ili estas malmultaj kaj la leganto baldaŭ atingas duan parton, 'Tra la lingvo', kiu enhavas ne nur artikolojn de D-ro Zamenhof, de pioniroj kiaj Cart kaj Privat, sed ĉerpaĵon el la moderna verko *Retoriko* de D-ro Lapenna. Ĉi tiuj prilingvaj artikoloj, kiuj feliĉe ne temas pri gramatikaj subtilaĵoj, kune kun tiuj pri la vivo de Zamenhof, estas bone elektitaj kaj kondukos la komencanton en la spiriton kaj tradiciojn de la lingvo.

La trian parton, kiu havas la titolon, 'Tra la literaturo', mi trovis ne sufiĉe ampleksa. Kvankam aperas, ekzemple la nomoj de Kalocsay kaj Baghy, mankas tiuj de Kabe, Stellan Engholm, kaj aliaj elstaraj verkistoj, kies envicigo estus doninta pli larĝan perspektivon de la Esperanta literaturo. Tamen la kompilinto ne celas antologion kaj ĉi tiu parto ja enhavas plurajn gemojn. Estis kontentige trovi verkon premiitan en Belarta Konkurso (la poemon *La Kanto de la Ĝojo* de D-ro Musella).

La libro, rekomendata de la Itala Instituto de Esperanto, estas tre

taŭga por la progresanto kaj posedinda eĉ de la progresinto, kaj tial ĝi meritas bonan akcepton.

C. D. A. Capp.

***Sennacieca Revuo**, n-ro 80, 1952. Eld. S.A.T., Francujo. 18 × 22.50 cm., 56 paĝoj, broŝ. 4ŝ., afranko 4p.

La celo de tiu ĉi kajero estas doni iaspecan kultur-jarlibron pri la pasinta jaro, kaj la rezulto estas sendube interesa legaĵo. La titolo de la diversaj artikoloj estas: *1951...*! (Tre interesa analizo de la pasintjaraj mondokazaĵoj de L. Laurat), *Ŝparo kaj malŝparo*, *La ŝafoj kaj LI*, *Ekonomia kunlaboro en Skandinavio*, Raymond Schwartz satiras kaj vortludas en sia artikolo *Laŭ mia...* *Ridpunkto* kun nekontraŭstarebla bonhumoro, poste *Izraelio kaj ĝiaj problemoj*, *La batalanta spirito*—Pär Lagerkvist.

Eŭgeno Lanti (Waringhien), *La komplikeco de la sociaj problemoj*, Poemoj, resp. tradukoj de Maura, Emba kaj R. Schwartz, interesa lingva artikolo de J. Régulo Pérez pri *Estiĝo kaj rolo de la Iberiaj lingvoj*, artikolo pri la *francaj problemoj*, tradukita artikolo pri Sigmund Freud kaj la psikoanalizo, *La mirinda povo de la kortizono*, *Georgo Sorel* (A. Mildwurf), Kroniko pri la Esperanto-okazaĵoj en 1951, lingva artikolo de R. Laval *Pri propraj nomoj* (la aŭtoro pledas por akademia decido kaj speciala vortaro por la propraj nomoj, kiuj ĝenerale estu

esperantigitaj laŭ diversaj praktikaj vidpunktoj).

La mallongigo de 'kaj' je 'k' troviĝas en pluraj kontribuaĵoj. Sen punkto ĝi estas kvazaŭ escepto kontraŭ la fonetika legado de la lingvo, kun punkto ĝi ne signifas gravan ŝparon de literoj. Sekve ne malutilus ĉesigi tiun ĉi kutimon.

La revuo estas tre rekomendinda legaĵo.

F. Szilágyi.

***La Alaska Stafeto : Kaptitoj de la Glacirokoj** de F. Omelka. Eld. The Esperanto Publishing Co., Ltd., Anglujo. 96 paĝoj, 22×14.5cm. Prezo bind. 6 ŝil., aŭfranko 4p.

Kiam antaŭ kelkaj jaroj en *Esperanto* aperis la felietono *Kaptitoj de la glacirokoj* de nia samideano F. Omelka, mi legis ĝin kun granda intereso kaj ekhavis la ideon, ke estus bone represigi ĝin en libroformo. Ĉi tiu senpretenda, sed tamen interesa kaj streĉa historio, kun simpla lingvaĵo kaj multaj dialogoj ŝajnis al mi treege taŭga por komencantoj, por uzado en daŭrigaj kursoj, por komuna

legado en grupaj kunvenoj, k.t.p. Kaj la saman impreson mi havis ĉe la legado de *Alaska Stafeto*, kiu aperis poste.

Estas kompreneble, ke mi tre ĝojas, ke mia tiama ideo nun efektiviĝis. Kun plezuro mi denove tralegis ambaŭ verketojn kaj mia opinio pri ili ne ŝanĝiĝis. Sendube multaj el niaj legantoj ankoraŭ memoras la enhavon. Tial mi ne rerakontos ĝin. Mi nur rememorigas pri la simpatia S-ino Gibson, kiu tiel bone prizorgis siajn vunditajn kunpasaĝerojn, pri Marcel Payen, kiu timas veni tro malfrue por ankoraŭ savi sian eble kondamnotan amikon, kaj pro tio riskas serĉi elsaviĝon por si kaj siaj kunuloj . . . Kaj same pri Will Shannon, Wurd Kalland, Emil Erikson, Leonard Seppala kaj Gunnard Kasson, la kvin herooj de la *Alaska Stafeto*, kiuj kuraĝe kaj sinofere spitis la senkompatan naturon kaj preskaŭ riskis sian vivon por savi la al ili nekonatajn malsanajn infanojn de Nome . . . Kiu ne ŝatus legi denove ĉi tiun malgrandan eposon de homa bonvolo, helpemo kaj ofereco?

LA ALASKA STAFETO

kaj

KAPTITOJ DE LA GLACIROKOJ

Originale verkitaj de F. Omelka

Formato 22×14.5 cm.

96 paĝoj

Tole bindita kun bilda polvŝirmilo

Prezo 6 ŝil., aŭfranko 4p.

Mendu ĉe U.E.A.

Kunigitaj en preskaŭ centpaĝa libreto, zorge korektitaj de Mason Stuttard, sur bona papero, maldense presitaj, en simpla bindaĵo kun t.n. polvo-kovrilo, ĉi tiuj esperantaj originalaĵoj prezentas vere allogan legaĵon, kiu meritas lokon en la libroŝranko de ĉiu esperantisto.

Estas bona ideo aldoni portreton de la aŭtoro kaj kelkajn biografiajn notojn. Ni ekscias el tiuj, ke la verkinto naskiĝis en 1904 en Ĉeĥoslovakujo. Li estas instruisto kaj lernis Esperanton ("la plej granda aventuro de mia vivo") en 1932. Verkante li preferas aventurajn motivojn, sed ĉiam klopodas samtempe eduki al solidareco, kamaradeco, aŭdaco, sinoferemo kaj aliaj similaj ecoj. Li uzas nur tiajn temojn, kiujn donas la vivo mem.

Ni esperu, ke la debito de lia debuto estos tia, ke ĝi instigu lin daŭrigi sian esperantan verkadon!

Grupestroj ne forgesu atentigi siajn membrojn pri ĉi tiu novelдонаĵo.

d.B.

Kongresa Libro de la 37-a Universala Kongreso de Esperanto, Oslo. Ĉefredaktoro: Mason Stuttard. 14.5×21cm., 80 paĝoj, broŝ. (Jam elĉerpita).

Tiu ĉi eleganta libro estis fidela akompananto kaj eĉ direktanto de ĉiu kongresano dum la kongreso en Oslo. Post ĝia elprovo en la praktiko oni povas doni nur senrezervajn laŭdojn al tiu ĉi libro, kies zorge kolektitaj informoj tiel bone servis al la kongresanoj, ne nur kiam temis pri la programo de la kongreso, aŭ pri esperantaj lokaj informoj, sed ankaŭ tiam, kiam oni bezonis informojn pri la lokaj kutimoj. La formato estas iom pli granda ol niaj poŝoj, sed kiel ni informiĝis, tio dependis de ne-ŝanĝebla teknika detalo kaj dank' al tio la libro estis malpli ĉifona dum la ĉiutaga uzado kaj en pli bela stato aldonebla al la kongresaj dokumentoj kaj memoroj.

F. Szilágyi.

La Internacia Sanigejo por Universitatanoj, en Leysin, Svislando

LA Sanigejo en Leysin, kies progresema kaj paclaboranta direktoro estas D-ro Louis C. Vauthier, ekzistas por la kuracado de universitataj profesoroj kaj studentoj de ambaŭ seksoj kaj el ĉiuj landoj, kiuj malsanas pro tuberkulozo. Antaŭ nelonge oni faris decidon pri la instruado de Esperanto. Ni citu el tiu decido:—

“... oni instruos Esperanton al ĉiuj oficistoj, kuracistoj kaj malsanuloj en la sanigejo. Tiuj devige lernos ĝin por faciligi la interkomprenadon kaj komunan socian vivon absolute necesajn por la perfekta funkciado de internacia sanigejo por universitatanoj el tiom da diversaj nacioj. Ĉiujn informojn kaj demandojn farotajn al la malsanuloj, ĉiujn regulojn pri la biblioteko, k.t.p. ... oni redaktos kaj en la oficiala lingvo kaj en Esperanto. Elĉerpaĵojn el centoj da revuoj, venintaj de ĉie en ĉiuj lingvoj, kaj kiuj ne povas esti utiligataj de la studentoj ĝuste pro la lingva diverseco, oni tradukos en Esperanton ... per la helpo de la Centro de Esploro kaj Dokumentado de U.E.A. kaj de S-ro Henri Fischer. ... S-ro Fischer aranĝos pri la organizado de la instruado laŭ maniero taŭga al la cirkonstancoj, tiel ke sen komuna kurso kaj sen lacigaj movoj, la malsanuloj povos ne nur kompreni ĉion necesan, sed ankaŭ skribe kaj parole komprenigi sin. ...”

Ni gratulas al Akademiano Fischer kaj al la direktoro, D-ro Vauthier, kaj ni deziras al ilia laboro plenan sukceson.



Nia Forumo

PAROLAS LA LEGANTOJ

Korespondantoj nepre esprimu sin koncize kaj mallonge. Antaŭ ol sendi leteron por publikigo kontrolu la longon per komparo kun jam presita teksto.

Presigo de letero de korespondanto ne necese signifas ke U.E.A. oficiale subtenas la esprimatajn opiniojn.

Turismaj Broŝuroj

Antaŭ nelonge mi kunlaboris en la produkto de turisma broŝuro en Esperanto. La koncerna instanco havis multe da broŝuroj en 8-10 lingvoj kaj la penso trafis min, ke Esperantlingvaj broŝuroj kaj prospektoj devus ĉiam porti la vorton ESPERANTO sur la antaŭa/unua paĝo por ke la helpantoj kaj vojaĝantoj en la turistagentejo tuj sciu pri kio temas. Oni ne povas atendi ke la homoj konu ĉiujn lingvojn kaj eĉ se la nacilingvaj ne portas la nomon de la lingvo, almenaŭ ni povas klopodi por tio rilate al la Esperantaj.

Mi tial sugestas, ke ĉiu, kiu okupiĝas pri eldono aŭ preparo de Esperantlingvaj broŝuroj, zorgu, ke la vorto *Esperanto* kun aŭ sen verda stelo, troviĝu kie ĝi estas videbla. Utila propagando ankaŭ por la lingvo.

J. Stig Hansen, Norvegujo.

Numismatiko kaj Esperanto?

“L’Alliance Numismatique de Belgique”, starigita en 1950, sendis al siaj anoj monatan revuon dulingvan (franc- kaj nederlandlingvan).

En 1951 la organizaĵo fariĝis “L’Alliance Numismatique Européenne”; ĝi grupigas centojn da personoj, kaj multaj inter ili en Ameriko, Afriko, Aŭstralio; la monata revuo enhavas artikolojn francajn, nederlandajn, germanajn. L’Alliance Numismatique Européenne ankoraŭ multe pli

progresos kaj en 1954 ĝi organizos en Bruselo internacian ekspozicion numismatikan. La bulteno sendube enhavos baldaŭ ankaŭ artikolojn anglalingvajn. Ni esperas ke fine de 1954 la revuo estos kvinlingva.

Ĉiu lando kiu grupigas almenaŭ 60 anojn rajtas 4 paĝojn da teksto en nacia lingvo en la revuo kaj landa sekretario kiu estas kunigilo inter la Komitato de “Alliance” kaj la anoj de sia lando. Tiu sekretario rajtas ankaŭ verki mem artikolojn por la revuo. La nombro da paĝoj pliiĝas laŭ la nombro de la anoj.

Kaj Esperanto? Ĉu en la tuta mondo ne ekzistas 60 esperantistoj kiuj havas intereson por la numismatiko? Ĉu 4 paĝoj da teksto en esperanto, ĉiumonate, en grava revuo ne estus tre taŭga, interesa propagandilo por la verdstela movado? La artikoloj estante nesamaj, la neesperantistaj anoj dezirus kompreni la tekston, kaj verŝajne interesiĝus al la lernado de Esperanto. Esperantista delegito estas ankaŭ ebla se almenaŭ 60 anoj esperantistaj vivas en lando kie ne ankoraŭ estas landa sekretario.

Ĉiuj la Esperantistoj kiuj interesiĝas pri numismatiko sin turnu al la subskribinto, 58 rue de l’église St. Pierre, Jette-Bruxelles, Belgujo. Li havigos plezure ĉiujn deziratajn informojn.

Vanden Brande Frédéric.

Esperanto en la Praktiko

Iutage envenis en mian butikon sudamerikano nescianta svedan lingvon. Li demandis ĉu mi parolas angle, kiun lingvon mi bedaŭrinde ne scias. Li kunhavis lignan plataĵon por ŝranko, kaj li komprenigis signe ke li volus aĉeti tiajn. Mi, parte per signo parte per iome sciata germana lingvo, komprenigis al li, ke mi havigos informon pri la prezo de tiaj post kelkaj tagoj.

Alian tagon, kiam li revenis por scii la prezon, mi prezentis al li Francan-Esperantan vortaron, kaj pere de ĝi ni interkompreniĝis kaj faris negocon.

Estis la unua fojo ke mi faris negocon pere de Esperanto.

N.G.N., Svedujo.

Jes—Parazitismo !

Mi opinias, ke via ensendinto H. L. Egerrup (Julia n-ro, p. 218) miskonprenas la intencon de Mason Stuttard. Laŭ mia kompreno, ĉi tiu lasta skribis pri tiuj homoj, kiuj vizitas delegitojn kaj akceptas servojn kaj gastigadon **sen rekompence doni ion ajn**—eĉ sen vizito al la loka grupo. Kompreneble, tre ofte spertaj Esperantistoj vizitas iun lokon, kun la intenco fari prelegon aŭ paroladon. Tute certe M.S. ne skribis pri tiuj spertuloj, kiuj reciproke aŭ instruas aŭ faras prelegon, aŭ **iel ajn helpas la movadon**. Ni persone havis la honoron gastigi tiajn altmoralajn Esperantistojn kaj esperas estontece bonveni aliajn. Tamen tre plaĉis al ni vidi la averton al nesuspektantaj delegitoj, kiuj kompleze akceptas en la hejmon la bonenomitajn *parazitojn*; certe jam okazis al ni kaj preskaŭ certe okazas al aliaj delegitoj same—

eĉ ne poŝtkarto post la vizito por esprimi dankon aŭ saluti grupon.

Ni devas esti dankemaj al la fondinto de la internacia lingvo, ke li elpensis ne nur internacian lingvon, sed samtempe fondis movadon kun firma frateca bazo. Ni gardu kaj disvastigu tian idealon, sed estu iom singardaj kontraŭ parazitismo, kiu sendube kreskos, kun la kreskado de la movado. Estas nigra ŝafo en ĉiu ŝafaro !

*S-ino Winifred Laurie,
D. en Bournemouth, Anglujo.*

Internacia Konkurso 1952

Stato je la 31a de Aŭgusto 1952

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Izraelo ..	350	495	141.4
2.	Norvegujo ..	1700	1970	115.9
3.	Brazilo ..	4500	5178	115.1
4.	Maroko ..	500	575	115.0
5.	Kanado ..	250	270	108.0
6.	Italujo ..	2200	2290	104.9
7.	Islando ..	400	400	100.0
8.	Aŭstralio ..	850	845	99.4
9.	Germanujo ..	3200	3165	98.9
10.	Svislando ..	1400	1380	98.6
11.	Japanujo ..	900	885	98.3
12.	Urugvajo ..	250	245	98.0
13.	Sud-Afriko ..	300	290	96.7
14.	Nederlando ..	4800	4537	94.5
15.	Belgujo ..	2300	2116	92.0
16.	Danlando ..	2700	2455	90.9
17.	Francujo ..	5500	4981	90.6
18.	Usono ..	2500	2263	90.5
19.	Britujo ..	12000	10452	87.1
20.	Hispanujo ..	1300	1115	85.8
21.	Finnlando ..	2600	2105	81.0
22.	Svedujo ..	5200	4070	78.3
23.	Nov-Zelando ..	800	615	76.9
24.	Kubo ..	250	185	74.0
25.	Portugalujo ..	800	580	72.5
26.	Aŭstrujo ..	1000	690	69.0
27.	Irlando ..	250	170	68.0



D. R. Collins :

Pri Parfumoj

EN la pasinteco Anglujo estis la tradicia centro de tutmonda komerco pri malmultekostaj, sed ne tre bonkvalitaj, parfumoj. Fakte ne ĝenerale konata estas tio, ke jam dum 20 ĝis 30 jaroj Anglujo eksportas pli grandan kvanton da parfumoj, ol Francujo, kiun oni preskaŭ nature rigardas la hejmo de parfumoj. Kun la escepto de Sud-ameriko kaj Egiptujo anglaj parfumoj ĝuas preskaŭ monopolon en la mondmerkato ; kaj tre verŝajne unu rezulto de la klopodo konformiĝi al la indiĝenaj aĉetpovo estis tio, ke la kvalito de la parfumoj malaltiĝis, eĉ por la enlanda uzo.

Anglaj virinoj ĝenerale estas multe pli konservativaj en aferoj de modo, ol francaj, kaj precipe rilate al parfumoj la tradicio, ke ne estas dece pli ol odoreti je parfumo, tre—tro—persistas ĉe Angloj. En Francujo tamen la malavara uzo de parfumoj ĉiam estis kaj estas esenca parto de la arto sin vesti.

En Francujo la kreo de nova parfumo preskaŭ ĉiam estas la verko de unuopa parfumisto, kiu kutime laboras kiel artisto. En Anglujo tia aliro al la kreo de parfumo estis tiom malofta, ke oni povus diri, ke ĝi ne ekzistis. Antaŭe en Anglujo parfumojn kreis komitatoj ! Komitatoj de komercistoj, kiuj rigardis parfumojn kiel negocaferon. Tia komitato kutime fiksas la maksimuman prezon je kiu oni vendu konvenan botelon da parfumo. Ili

poste deprenis de tiu sumo la koston de botelo, etikedo, pakaĵo k.s. kaj alvenis per simpla procedo de subtraho al la prezo, kiun ili volas pagi por ĉiu *gallon* (angla mezuro, proks. 4 litroj). Ĉio ĉi antaŭiris eĉ la unuajn eksperimentojn pri la produkto de specifa parfumo !

La franca parfumisto estis multe pli konscia pri tio, kion li celas, kion la konkurenco disponigis, kion diktas la efemeraj gustoj kaj manieroj, kaj per sia normale ampleksa ingrediencaro ekklopodis krei parfumon, kiu kontentigos lian propran estetikan senton.

Konsidere al la du manieroj de aliro, ne estas mirige, ke la anglaj parfumoj ne ĉiam ĝuis reputacion pri bona kvalito.

Gravega ĉe parfumoj estas la botelo. En Francujo oni delonge fabrikis boteletojn kun vitraj ŝtopiloj. La smirgado de vitraj ŝtopiloj tamen estas longa kaj tre individua operacio, kiu postulas altan gradon de kompetento ĉe la laboristo. Por produkti grandan kvanton da vitroŝtopilaj boteloj je ekonomia prezo, estis necese disponi pri granda rezervo de alte kompetentaj specialistoj laborantaj je kompare malaltaj salajroj. En la intermilita tempo tiu duo da cirkonstancoj ekzistis pli vaste en Francujo ol en Anglujo, kaj en la laste nomita lando la uzo de vitraj ŝtopiloj estas dum multaj jaroj kompare malofta.

Pro sia deziro havi grandan kvanton da kompare malmultekostaj

boteloj, anglaj fabrikistoj uzis ŝraŭbajn kovrilojn por parfumboteloj pli vaste kaj pli frue ol siaj francaj konkurencantoj. Kiam oni unue enkondukis la ŝraŭbajn kovrilojn la kutimo estis uzi larĝtrujajn botelojn, kaj kvankam laŭ la starpunkto de la parfumisto la rezulto estis kontentiga, la fakto baldaŭ evidentiĝis, ke larĝa truo kun ŝraŭba ĉapo permesis pli altan gradon de forvaporigo en varmaj landoj. Pro tio la pogutiga botelkolo fariĝis populara ĉar la mallarĝa truo malhelpis troan perdon pro vaporigo. En preskaŭ ĉiuj arabaj kaj afrikaj merkatoj la plej granda nombro da parfumuzantoj estas viroj, kiuj antaŭe verŝis la parfumon sur la kapon kaj ŝultrojn. Sekve la nova botelo estis pli oportuna por tiu rito ! La enkonduko de pogutiga botelo bone taŭgis ankaŭ al la tradicia angla prefero por malgrandaj dozoj de parfumo.

La parfumojn produktatajn en Anglujo, ekzemple de *GOYA* kaj similaj novskolaj parfumistoj, oni fabrikas el tute similaj ingrediencoj, kiel la francaj parfumistoj. Iuj krudaĵoj venas de Grasse, sed multaj originas en britaj landoj (ekz. cedro, santalo, kenja lavendo, paĉulo k.s.). Ĉiu unuaranga parfumisto, ĉu franca, ĉu angla, disponas la samajn teknikajn rimedojn, kaj la diferenco inter unu bona parfumo kaj alia grandparte estas afero de persona gusto de la uzanto aŭ individua lerto de la kreinto.

Francaj parfumistoj multe suferis pro la milito. La ĉefaj kaŭzoj estis (a) preskaŭ tuta manko de fiksiloj en tiu lando. La ĉefaj fiksiloj—ambro el Sudafriko kaj Novzelandoj, cibeto el Etiopio kaj mosko el Tibeto—ĉiuj venas de landoj kun kiuj Francujo ne havis kontakton dum kaj kelkan

tempon post la milito ; (b) francaj parfumistoj ne sufiĉe alte taksis la kapablon de klientoj distingi inter bonaj kaj nebonaj parfumo, kaj fabrikis parfumojn en kiuj mankis fiksiloj kaj kiuj estis tre nefortaj. Ili malatentis la fakton ke usonaj soldatoj aĉetis parfumojn en Parizo kaj ofte vendis ilin al komercistoj en Novjorko, kiuj siavice vendis ilin al sinjorinoj jam kutimiĝintaj al la altaj kvalitoj de la sama marko antaŭ la milito. Tio detruis fidon kaj klientoj turnis sian atenton al novaj parfummarkoj.

La ĉefaj kvalitaj faktoroj ĉe parfumo estas daŭropovo kaj konstanteco. En la lastaj jaroj anglaj virinoj estas multe pli parfumemaj ol antaŭe. Tamen kvankam ili nun multe pli uzas ilin, la fakto restas, ke malmultaj el ili komprenas la ĝustan teknikon de apliko. Mi rimarkis interesan uzon de parfumo kiam mi revenis de Usono sur la *Queen Elizabeth*. Unu vesperon franca amikino inter ni portis *Great Expectations* de Goya. Ĉeestis du anglaj sinjorinoj el kiuj unu portis *Carnet de Bal* de Revillon kaj la alia uzis *Je Reviens* de Worth. Kvankam la nomitaj francaj parfumo estas multe pli fortaj kaj havas pli da karaktero ol tiu de Goya, *Great Expectations* tamen multe superis ambaŭ. La franca sinjorino malavare uzis ĝin sur la ŝultroj, malantaŭ la oreloj, ĉe la haroj kaj sur vato interne de la robo. La efekto estis frapa kaj sekvis nur el tio, ke ŝi sciis ĝuste uzi parfumon.

(Kompilita kaj libere tradukita de M. Otiel laŭ informoj afable donitaj de D. R. Collins, 161 New Bond street, London, laŭ ties parolo en la radio. Ni esprimas nian dankon pro la informoj donitaj.)

Franjo Majetiĉ :

La teatro en Jugoslavujo

PAROLANTE pri nia hodiaŭa kultura vivo necesas menciĝi unualoke la teatron. Ĝi portas novajn karakterizojn, malsamajn de la antaŭaj. La plej ĉefajn oni povas ilustrigi jene : unue, tute ŝanĝita rilato de la registaro al teatra arto ĝenerale ; alivorte ĉiufanka helpo, senĉesa zorgo pri la teatro kaj materiala helpo kiu ebligas sukcesan evoluon ; due, ankaŭ la popolo rilatas alimaniere al la teatro, rigardante ĝin kiel instruon ŝtupon ; trie, grandega alfluo de nova publiko el popoltavoloj kiuj ĝis nun preskaŭ neniam estis tuŝitaj per teatraj prezentadoj ; kaj kvare, ĉio menciita vidigas al ni novan, socian rolon de la teatro en nia kultura vivo, instruado kaj klerigo de la larĝaj popolamasoj.

En nia lando nun troviĝas ĉ. 50 teatroj, kiuj per konstanta laboro kaj belegaj sukcesoj faras videblan kontribuon al la komunumo. Ili ne limigas sian agadon nur inter la limoj de urboj, sed propagandas la arton ĉiuloke en vilaĝoj, eĉ en laborejoj. Krom teatroj ekzistas ankaŭ amatoraj grupoj disigitaj en la plej malproksimaj lokoj.

La aktoro ĝuas sekurecon. Li estas pagata laŭ siaj kapabloj kaj ne plu estas ligita kontrakte al teatro. Ne plu okazas, ke niaj aktoroj dependas de unuopuloj kaj ties humoro, kaj ne okazas nun, ke tiuj povas ilin forigi kiam ajn ili volas. Tamen la aktoro havas novan devon antaŭ la komunumo. La teatra laboranto nun estas klerigita ĝis la grado de la artisto. Li estas kulturelaboranto kun ĉiuj ebloj por laboro kaj memeduko. Li estas rigardata kiel la kreanto de pli bona vivo kaj aktive partoprenas

en la aliformigo de la socio.

Centraj teatroj troviĝas en Beograd, Zagreb, Ljubljana, Sarajevo, Skoplje kaj Cetinje. Ĉi tiuj

teatroj agas sub la gvidado de art-specialistoj, kies nomoj estas konataj tre vaste eĉ ekster la lando. Inter ili menciindaj estas D-ro Branko Gavella, nuntempa reĝisoro de la teatroj en Zagreb kaj Ljubljana ; koreografoj Ana Boje kaj Oskar Harnos ; majstroj de baletoj Pia kaj Pino Makar ; plue reĝisoroj D-ro Marko Fotez, D-ro Branko Kreft, prof. J. Sest, prof. Tito Strozzi kaj prof. Merko Perković. Elstaraj inter niaj nunaj kantistoj estas Zinka Kunc, Milanov kaj Dragica Martinis. Komponistoj atingintaj internacian famon estas J. Gotovac, F. Lotka, K. Bazanora, Ivo Tijarolović kaj dirigentoj* Matačić kaj Hristić.

Malgraŭ kelkaj eminentaj verkistoj —J. Horvat, R. Filipović, S. Kolar— inter la nova skolo, kaj prezentado de malpli novaj teatraĵoj, la repertuaro grandnombre konsistas el teatraĵoj de eksterlandaj verkistoj : Shakespeare, Johnson, Molière, Goethe, Schiller, Dickens, Schneider, Goldoni, Gogol, k.a.

La dramateatro funkcias senescepte sur realisma fundamento, forigante ĉiun dekadencan. Oni sekvas plejparte la metodon de Stanislavski. La lernejoj por aktoroj ebligas al junaj talentoj formiĝi kaj evoluigi siajn kapablojn, kaj kiel en la muziklernejoj



*Franjo Majetiĉ :
aktoro kaj reĝisoro de
nacia teatro en Zadar*

* *dirigento*—estro de orkestro



Sceno el tragedio "Kabale und Liebe" de F. Schiller. Sur la scenejo Ema Kifner kaj Davor Mladinov.

oni lernadas senpage. Kiom grandan intereson havas nia publiko por la dramo kaj operprezentado montras al ni la teatroj ĉiam plenplenaj de homoj.

Per daŭrigo de sia laboro por plialta nivelo de la arto, kaj por pli firma ligiteco inter la laborantaj homoj, nia teatro ĉiam pli kontribuas siaflanke al plialtigo de nia kultura vivo.

daŭrigo (de dekstre)

*La straton apatie mi descendis,
dum ĉiu arbortorso gutis larme
kvazaŭ pri sia sorto ĉiu plendis*

*"Do vin la homo dresis!" mi malvarme
konstatis, kiam, jen! kvin verde spontaj
folioj sur dolora stump' alarme*

respondis: "Ne, ni spitas!"—

Ha, senhontaj!

R. Rossetti.

La Stumpaj Arboj

I

*En nia strat' la balaistoj ŝanĝis
la rolon kaj aperis kun hakilo,
pioĉo kaj segilo, kaj fortranĉis*

*la branĉojn de la fagoj. Ho, mutilo!
La dolĉaj fagoj, kiuj nin aleas,
forperdas siajn sprosojn en Aprilo!*

*Kaj dum la branĉoj falas kaj pereas,
la amputistoj bonhumore viglas,
kriante: "For! Vi nur foliojn kreas*

*Por ĝeni nin aŭtune dum ni striglas
la urbajn stratojn!"—Tiel, ekzekute,
tra l' longa strato ili gaje migras.*

La stumpaj arboj siluetas mute.

II

*Jes ja. En niaj stepoj de bitumo,
ĝangaloj de betono, ni bezonas
ankoraŭ ian spiron en la humo.*

*Ni tial plantas arbojn, sed ordonas,
ke ili ne etendu sin sovaĝe,
sed kresku dece, ĉar aleo donas*

*bontonon al kvartalo, sed domaĝe
foliojn ŝuti rube sur pavimon
aŭ en ĝardenojn! Ne—ni tondu saĝe.*

*Ho, fagoj! Vian kriplan anonimon
mi vidas kun hororo kaj sufero.*

Vi gestas fikse, kvazaŭ vi animon

enfermus, kiel arboj de Infero.

III

*En pluva tag' la domon mi eliris.
Tra l' strato kia trista panoramo!
Eble tiele la krucar' spaliris*

*Sur Via Appia, kiam post la dramo
de l' tondra sklauribel', Spartako pendis
kun sepcent, dum forfumis la viv-flamo.*

Sendefendaj Manoj

(Frue en la historio de Nova Zelando, iu guberniestra edikto instigis de la maorioj tre elokventan proteston. La konata misiisto G. A. Selwyn (elp. Selŭin) poste uzis tiun proteston por riproĉi la maoriojn, kiuj murdis junan knabon. En la poemo Selwyn sidas apud kunvena fajro kun la maorioj, kaj rakontas jene) :

*“Iu viro sonĝis, kaj al tiu ŝajnis,
Ke li sidas apud granda fajro, gasto
De la triboviroj. Tiuj koleriĝas,
Ĉar guberniestro, antaŭ kelkaj tagoj,
Ilin malpermesis porti la pafilojn.
Dum la triboviroj tion diskutadas,
Jen aperas antaŭ ili en la flamoj
La figuroj de fortika juna ĉefo,
Nobla maorio, lerta batalanto.
Tiu en la sonĝo siajn brakojn levas,
Kaj etendas siajn manojn al la viro
Kiu sonĝas ; kaj al tiu li parolas :
“ ‘Ho Guberniestro, el ĉi tiuj manoj
Vi forprenis la pafilon ! Tamen sciu,
Ke ĉe ni la moro estas ja pli justa :
Ĉar, se malamiko ne armilon havus,
Ni al li armilon donus, por certigi,
Ke la venko estu ĉiel honoriga :
Ho Guberniestro, ĉu vi do ne hontas
Pri ĉi tiuj, miaj sendefendaj manoj ?’*

*“Kaj la maorioj ĉirkaŭ la fajrego
Tiujn bravajn vortojn de la nobla ĉefo
Laŭte aplaŭdante, gloras kaj eĥigas.
Kaj la flamoj pli altiĝas, kaj la nuboj
Koloriĝas kiel sango ; ĝis en brilo
Ekflaganta la ĉefulo malaperas.
Sed kriege disvastiĝas lia diro :*

*‘Ho Guberniestro, ĉu vi do ne hontas
Pri ĉi tiuj, miaj sendefendaj manoj ?’*

*“Kaj la viro sonĝis, ke post kelka
tempo
En la fajro jam vidiĝas nova formo,
La figuro de junknaba blankhaŭtulo :
Tre malforta kaj tre juna li aspektas ;
La vizaĝon, palan pro subita morto,
Naŭze ŝmirmakulis lia propra sango.
Al la maorioj flustre li parolas :*

LETEROJ DE L. L. ZAMENHOF

La tragedio de lia vivo rivelita de
lia retrovita korespondo kun la
francaj eminentuloj. Prezento kaj
komentado de Prof. G. Waringhien.

1a volumo, 1901-1906—388 paĝoj

2a volumo, 1906-1914—374 paĝoj

21 × 14.5 cm., bindita

Nuna prezo : Ĉiu volumo 17ŝ. 6p.
afr. 9p.

Mendu ĉe


UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Heronsgate, Rickmansworth, Herts.,
Anglujo

*“ ‘Kontraŭ min vi venis kaŝe en la
nokto,
Kontraŭ min multnombre vi kuraĝe
venis,
Kaj per hakilegoj min ĝismorte batis.’
Malrapide li etendas siajn manojn
Kaj al tiuj silentuloj li demandas :
“ ‘Ho fortikaj viroj, ĉu vi do ne
hontas
Pri ĉi tiuj, miaj sendefendaj manoj ?’
Poste malaperis ankaŭ tiu knabo,
Kaj la viro kiu sonĝis, revekiĝis.’*

*Oni finis la rakonton, kaj atendis.
Sed la aŭskultintoj ĉirkaŭ sia fajro
Longe silentadis, antaŭ ol demandi :
“Kion do signifas stranga sonĝo ?”
Tamen laŭmiene ili ja komprenis ;
Kaj stariĝis unuope kaj foriris.*

Brendon Clark.

Enigma Konkurso N-ro 71



Solvojn oni sendu al S-ro P. H. Mooy, 28 rue Stuyvenbergh, Brussel II, Belgujo. Por ĉiu tute korekta solvo oni kutime donas 5 poentojn. Ĉiufoje la tri personoj, kiuj havas la plej altajn poentnombrojn, gajnas premion. Ĉiu MA de UEA kun la sama ŝanco povas komenci la sendon de la solvoj je kiu ajn momento.

Pliaj informoj, se dezirataj, riceveblaj de S-ro Mooy kontraŭ unu respondkupono internacia.

Enigmo N-ro 159 : La vortoj de kvin esprimoj el la proverbaro de D-ro Zamenhof intermiksiĝis. Mi donas ilin en alfabeto sinsekvo, kaj vi bonvolu reordigi ilin.

al - amen - amikeco - atingas - baldaŭ - bonon - ĉesas - ĉio - ĉion - des - dirus - donas - eksvingas - estus - fingron - forgesas - fortika - havu - ju - kaj - kaj - kalkuloj - ke - la - la - lanon - malbonon - mastro - memori - mi - ne - ne - nur - oni - oni - oro - panon - pli - pli - por - precizaj - se - se - sian - ŝafo - tamen.

C ₁	A ₂	O ₃	S ₄
L ₅	I ₆	T ₇	N ₈
G ₉	D ₁₀	O ₁₁	R ₁₂
E ₁₃	L ₁₄	A ₁₅	M ₁₆

la vorton “marmoto” (sed ne uzu tiun vorton en via solvo !).

Ensendis S-ro G. Englert (Germ.)

Enigmo N-ro 161 : Faru ĉenon de 24 trisilabaj vortoj, en kiu ĉiu nova vorto komenciĝu per la lasta silabo de la antaŭa vorto. La 1-a, 5-a, 10-a, 15-a, 20-a kaj 24-a vortoj signifas : 1. danĝera substanco ; 5. doktrina kredo ; 10. denove diri ; 15. akvonimfo ; 20. rilatas certan ornamanto stilon ; 24. kiel 1. La unuaj silaboj de la 1-a, 5-a, 10-a, 15-a kaj 20-a vortoj formas en tiu sinsekvo kvin silaban vorton, kiu signifas : ia kuracisto. La unuaj 23 vortoj komenciĝu ĉiuj per malsamaj silaboj.

Enigmo N-ro 160 : El la ĉi-kuna figuro oni elprenu 16 vortojn, paŝante de kvadrato al kvadrato kiel la reĝo en la ŝakludo. Ĉiuj el tiuj 16 vortoj devas komenciĝi en alia kvadrato. Ordigu tiujn vortojn laŭ la nombroj de la kvadratoj en kiuj ili komenciĝas kaj aldonu al ĉiu vorto interkrampe la nombron de ĝiaj literoj, kaj je la fino de la solvo la sumo de tiuj nombroj. La dekonio de tiu sumo formas vian poentnombro. Kiel ekzemplo de la solvo : komencante en la 16-a kvadrato oni povas formi

ELEKTITAJ RAKONTOJ

Elin Pelin

Traduko kaj klarigaj notoj de
Simeon Hesapčiev

Prezo : 2 ŝil., aŭfranko 2p.
aŭ 7 int. rpk.

Eldonita de
Bulgara Esperantista Kooperativo

Mendu ĉe
UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Heronsgate, Rickmansworth, Herts.,
Anglujo

R. Edis Fairbairn

Nia dometo

CAR interesas min ekscii, kiamaniere vivas aliaj personoj en aliaj landoj, mi opinias, ke kredeble aliaj interesiĝos en detaloj de nia mastrumado.

Dum mia tuta aktiva vivo kiel pastro mi loĝis en domoj, kiujn mi nek luis. Posedis ilin la lokaj eklezioj. Tio estis iom avantaĝe, iom alie. Tio afliktis la edzinon pli ol min. Kiel virino ŝi ĉiam antaŭenrigardis al tempo, kiam ŝi povos mastrumi propran hejmon. Tio dependos de du kondiĉoj: ĉu ni ĝisvivos pensian aĝon; kaj ĉu ni povos ŝpari sufiĉe da mono por, eble, aĉeti dometon. Surprize, ambaŭ plenumiĝis; la unua danke al la bona dio, la dua danke al lerta mastrumado de mia bona edzino. Kelkjare antaŭ emeritiĝo ni serĉis aĉeteblan domon en la kampara urbeto proksime de la farmbieno de nia bofilo. Prezroj de domoj jam komencis plialtiĝi. Iatempe oni povis aĉeti mezkvalitan domon je mil dolaroj. Ni bonŝance trovis malgrandan domon el ligno konstruitan sur fundamento betonbrika. Ĝi konsistis el ĉefĉambro kaj du litĉambroj, kuirejo kun manĝaĵŝranko, banĉambro kun necesaj kromaĵoj, kaj provizo de urba akvo. Por ĝenerala vintra hejtado ĝi havis karban fornon en kelo kies krado en planekon de la ĉefĉambro liveris varman aeron kiu ĉirkaŭfluis al ĉiuj anguloj kaj ĉiuj ĉambroj. La posedanto postulis 2250 dolarojn. Ni decidis aĉeti, kaj nia filino entreprenis trovi luprenanton kaj trakti aferojn.

En la kvin jaroj antaŭ emeritiĝo ni sukcesis elpigi pruntòn tiel ke ni

povis ekposedi propran hejmon senŝulde. Tiam ni transmovis nin, farigis necesajn riparojn, enigis niajn aĵojn kaj ekvivis nian propran vivon.

Aparte mi mem aranĝis unu angulon de la suba etaĝo kiel laborejon, instalante mian benkon, tornilon, maŝinsegilon kaj aliajn ilojn; ĉar mi intencis ŝanĝi mian dumvivan ŝatokupon lignometian en kromenspezigan tasketon. Ofte oni diris: "Oni ne povas vivi per nura pensio." Oni povas ekzisti, sed ne libere vivi. Nia pensio pagas 680 dolarojn jare. Tio provizas buterpanon. Ni ne tre ŝatas viandon, sed ni deziras nutraĵon ankaŭ por la animo, k.t.p.

Mi dum multaj jaroj kultivis meblometian kompetenton kiel ludlaboron. Mi desegnis specialan pleton per kiu ricevi mondonacojn en preĝejo, pleton kiu malemas glitfali el varma mano kaj disŝuti monerojn sur la plankon. Tio estis aprobita en la uzado kaj la eklezia provizejo volis disvendi. Do mi komencis produkti ilin, estante 68-jara, sed neniam suferinta seriozan malsanon. Mi tamen suferis mildan atakon de paralizo, malsanis kelksemajne, sed baldaŭ retrovis preskaŭ mian tutan manpovon, kaj rekomencis labori. Per helpo de elektraj motoroj ĉe miaj tornilo kaj segilo mi havas eble 75% da kompetento,* kaj mi jam fabrikis ĉirkaŭ 200 de tiuj pletoj!

Do ni kapablas iom pli ol nur ekzisti. Por faciligi al la edzino la mastruman laboron—ĉar ankaŭ ŝi ne fariĝas plijuna—ni instalas elektran bakforon kaj elektran lavmaŝion. Por forporti la cindrojn de la granda

forno ni aranĝis ke knabo je malgranda pago forportu la ujojn el la kelo ĝis la vojflanko. Tie la urba vagono kolektas.

Urba akvo estas tre “malmola”, t.e. enhavas multe da solvitaj kalko kaj fero. Ni tamen havas akvujon, kiu mal-malmoligas ĝin konstante! Tio bezonas, ke mi enigu iom da ordinara salo en ĝin post ĉiu trisemajna periodo. Ne demandu min pri tio, kiel ĝi funkcias. Mi ne scias.

Ni havas ankaŭ aŭtomatan elektro-akvohejtigilon, kiu provizas al ni konstantan fluon da preskaŭ bolanta akvo tagnokte. Tion ni ne aĉetis, sed luprenis je pago de du dolaroj monate aldone al nia monata kalkulo.

Antaŭe nelonge la estroj de la publike posedata elektroservo de Ontario decidis ŝanĝi la alternantan ciklon de 25 ĝis 60 cikloj ĉiusekunde. Tion oni ĵus faris tra nia urbo kaj liveris interŝanĝe por niaj iloj novajn taŭgajn por la nova frekvenco. Tion oni faris senpage! Forte impresis nin egale la kompetento kaj ĝentileco de ĉiuj lertuloj, kiuj eniris nian hejmon tiucele.

Nu, kiel maljunaĉuloj — ne, espereble, maljunulaĉoj! — ni estas tre dankaj, ke ni havas propran hejmon, proksime de nia filino, kaj ne tro malproksime de la genepoj, kiujn ni ĉiam ĝojas vidi venantaj, kaj eĉ pli ĝojas vidi forirantaj! Kun telefono per kiu mendi ĉe butikoj, voki la filinon kaj, se necese, la kuraciston; kun komfortaj litoj, varmo en vintro kaj kun multaj bonaj amikoj.

* Pri la kompetento de S-ro Fairbairn atestu la bele farita ksilogravuro pri Kanado, kiu ornamas la kovrilon de nia februara 1951 numero.—Red.

Esperantista Vivo

Naskiĝoj

Hartley. Al Ges. Vera kaj John Hartley (VD de UEA, 41 Linden Road, Manchester 19, Anglujo) filino Sheila Margaret, je 25 aŭgusto 1952.

Geedziĝo

Luez-Ollivand. S-ro Daniel Luez, D. de U.E.A. en Laon, Francujo, kun F-ino Annick Ollivand el Nantes, ankaŭ samideanino, je 28 julio 1952.

Al ĉiuj ni esprimas nian sinceran gratulon.

Niaj mortintoj

Ni eksciis pri la forpaso de la jenaj samideanoj al kies parencoj ni volas esprimi nian profundan kondolencon.—Red.

Dubin, S-ro Joseph, en Philadelphia, Usono, je 9 januaro 1952. Dumviva Membro de UEA.

Fink-Jensen, S-ro St., en Vejle, Danujo, je 24 junio 1952, 69-jara. Antaŭe Komitatano de UEA kaj ĉefestrarano de CDEL.

Mellichamp, S-ro A. S., en Peoria, Usono. Antaŭe D de UEA.

Mithey, S-ro Alfred, apud Parizo, Francujo, je 6 septembro 1952, 78-jara. Pioniro (pli ol 50-jara Esperantisto), li multe laboris eĉ ĝis la lastaj tagoj; li ĉeestis multajn kongresojn kie li aparte estis fame konata pro la bela blanka barbo!

Pamies, Pastro J., kananoniko kaj paroĥestro, en Tarragona, Hispanujo, je 18 junio 1952. Esperantisto de 1908.

Ritmeester, S-ro J., en Alblasterdam, Nederlando, je 14 julio 1952, pro aŭtoakcidento.

Vasconcelos Lopes, Artur Dias de, en Rio de Janeiro, Brazilo, je 21 Marto 1952. Dumviva Membro de UEA.

Fotoj de la bildoj sur p. 239 kaj 247 de la Kongresa numero estas haveblaj ĉe S-ro Benny Nielsen, Vejlevej 49, Kolding, Danlando, po 2 respond-kuponoj por unu foto, inkluzive afrankon.

La Alaska Stafeto

(Tra la jaro 1951 aperis en *Esperanto* felietono kun la ĉi-supra titolo. Temis pri ekscitaj travivaĵoj en la malproksima nordo. Verŝajne la plimulto de legantoj supozis, ke tio estas interesa fantaziaĵo flanke de la aŭtoro F. Omelka. *Esperanto* eĉ ricevis proteston de unu leganto pro tio ke ĝi publikigis historion pri inokulado de sero. Per la jena artikolo ni konigas al niaj legantoj detalojn pri unu el la homoj en tiu rakonto, Leonhard Seppala, ankoraŭ vivanta. La alaska stafeto fakte okazis !—M.S.)

LA Elmigra Muzeo (Utvandrer-museet), fondita de Nordmann-Forbundet en kunlaboro kun Norvega Popolmuzeo, ricevis tre altvaloran aldonon ĉar nia samlandano, Leonhard Seppala, donacis al la muzeo tiun sledon per kiu li gajnis siajn vetkuradojn, kaj krom tio sian polusan kaj orfosan ekipon. La donacoj ĵus venis al Norvegujo per ŝipo de Seattle.

La nomo de L. Seppala estas konata preskaŭ tra la tuta mondo. Li naskiĝis sur la insulo Skjervöy en Lofoten, Norvegujo, kaj komencis kiel juna knabo lerni la forĝistan metion. Post kelkaj jaroj en Oslo li vojaĝis al Ameriko helpate de Jafet Lindeberg.*

Al Ameriko li venis en 1900 kaj vojaĝis rekte al Alasko. Tie li komencis la orfosadon kaj estis dum kelka tempo inspektoro ĉe ormina asocio. Tiam okazis, ke li estis “delogata”—kiel li mem ĝin esprimas—partopreni en la famaj “All-Alaska Sweepstakes” (tutalaskaj vetkuroj), la longadistancaj kuradoj per hundoj. En tio li tute venkis la favoratojn kaj subite fariĝis la plej elstara hundveturigisto en la mondo. Kaj tio estis bona titolo, ne malpleje en Alasko en tiu tempo.

Seppala gajnis pli da vetkuradoj kaj faris pli da rekordoj ol iu ajn hundveturigisto en la mondo. Tri jarojn sinsekve li gajnis la “All-Alaska Sweepstakes”, vetkuron de preskaŭ

70 norvegaj mejloj† kaj la kurado daŭris ĉ. 78 horojn. La orfosistoj jam trovis ion je kio veti! Hodiaŭ tiuj ĉi vetkuroj malofte ampleksas pli ol 5 mejlojn. Krom tio Seppala vetkuris en multaj usonaj ŝtatoj, ekzemple tri jarojn sinsekve li gajnis la “New England Derby”.

† pli ol mil kilometroj.



Leonhard Seppala kun du el liaj hundoj

* Jafet Lindeberg: la homo kiu la unua trovis oron en Alasko.



Seppala kun sia jungaĵo

Sian plej grandan heroaĵon Seppala faris en 1925 spitante la vintrajn ŝtormojn kaj krozante pli ol 100 mejlojn da tundro por alporti seron kaj tiel savi centojn da homvivoj, kiam difteria epidemio atakis la urbon Nome. Ne strange, ke la grandfaro fariĝis legendo en Alasko.

Kvankam Seppala estis hundveturigisto kiu komprenis la arton ekzerci kaj gvidi siajn bestojn, li certe ne multon plenumus se li ne havus aparte bonajn hundojn; kaj ankaŭ en tiu rilato Seppala montris sin spertulo. Oni priridis lin kiam li provis per siberiaj hundoj, kompare malgrandaj bestoj kiuj pezis 10–15 kilogramojn malpli ol la plej popularaj sledhundoj. Tamen Seppala sciis, kion li faras; liaj hundoj montriĝis pli superaj ol ĉiuj aliaj.

Nun Seppala estas 74-jara. Lastjare li estis hejme en Norvegujo dum multaj monatoj kaj ni plene konvinkiĝis ke la onidiroj pri lia vikleco, malgraŭ lia granda aĝo, ne estas troigitaj. Pasis nur kvin jaroj de kiam li partoprenis en sia lasta vetkurado en Alasko. En 1946 li

transloĝiĝis de sia hejmo en Fairbanks al Seattle, sed ĉiusomere sin anoncas la alaska febro denove kaj Leonhard devas vojaĝi norden por rigardi sian domon kaj renkonti siajn malnovajn amikojn tie supre.


La sledon, kiun li donis al la Elmigra Muzeo, li mem faris. Ĝi estas konstruita laŭ la spertoj, kiujn li post preskaŭ preterhomaj streĉoj akiris sur la tundroj kaj en la arbaroj de Alasko. La Elmigra Muzeo estas al Leonhard Seppala tre dankema pro la donaco. Ĝi estas unu el la plej gravaj objektoj en la muzeo.

Kun afabla permeso de "Nordmanns-Forbundet", al kiu ni ŝuldas dankon pro prunto de la fotoj, tradukita de H. Fridén.

Brendon Clark :

Nuda vero

*Ĉiun veron, kiel ĉe infano,
Ĉarme la poeto vestas.
Ĉiu verso estas vortolano,
Kiu sur la menso restas
Glata kiel ganto sur la mano.*



Radio kaj Esperanto

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

En la tabelo horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon.

Por somera tempo oni aldonu laŭ neceso—kutime 1 horon.

Mallongigoj : I=Informoj, P=Parolado, K=Kurso, M=Muziko

Lundo	18.00–18.30	Rabat. 482m. K (franclingve). Radio-Maroc, Rabat, Maroko.
	22.15–22.40	Hilversum, 298m. kaj 188m. I.M. (ĉiun duan lundon) : V.A.R.A. Heuvellaan 33, Hilversum, Nederlando.
Mardo	00.45–01.00	Bauru. 91m., 240m. K. I. Radio Bauru, Brazilo.
	07.45–08.00	Lille. 235m. K. I. Esperanto, 94 rue de la Rochelle, Tourcoing, (Nord), Francujo.
	11.55–12.00	Bern. 48.66m., 31.46m., 16.87m. P. D-ro Baur. SRG, Kurzwellendienst, Neuengasse 23, Bern.
	15.00–15.15	Wien. 203m., 25m., 30m., 41m., 48m. P. (ĉiun duan mardon).
	17.35–17.40	Bern. 48.66m., 31.46m., 19.60m. P. D-ro Baur.
Merkredo	15.45–16.00	Graz. 417.2m. K (ĉiun duan merkredon) Radio Graz, Aŭstrujo.
	18.00–18.20	Roma. 25.21m., 31.35m., 49.92m. P. Radio Roma—Esperanto, Via Vittorio Veneto 56.
	19.30–20.00	Madrid. 225m., 42.33m. P. Radio S.E.U., Sección Esperanto, Diego de León 49, Madrid, Hispanujo.
	21.35–21.40	Wien. 513m., 25.46m., 48.74m. I. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV, Aŭstrujo.
Jaŭdo	08.30–08.45	Paris. 348m. K. Esperanto-Office, Orléans (Loiret), Francujo.
	11.55–12.00	Bern. Kiel marde. P. D-ro Privat.
	17.35–17.40	Bern. Kiel marde. P. D-ro Privat.
Vendredo	18.00–18.20	Roma. Kiel merkrede.
	22.15–22.30	Hilversum. 298m. P. (nur 14.XI. kaj 12.XII.) N.C.R.V. Schuttersweg 8, Hilversum, Nederlando.
	22.30–23.00	Hilversum. Kiel lunde, sed ĉiusemajne. M.
Sabato	08.30–09.00	Rio de Janeiro. 375m., 30.71m. K. I. Radio Ministério da Educação, Rio de Janeiro, (DF) Brazilo.
	22.15–22.20	Hilversum. 298m. P. K.R.O., Emmastraat 52, Hilversum, Nederlando.

Horsistemoj. Responde al kelkfoje esprimitaj petoj, jen estas la korektoj farotaj en diversaj landoj al la ĉi supre indikitaj horoj (horsistemo de Greenwich aŭ vintra brita).

Aldonu	1	horon :	<i>Britujo (somere), Nordafriko, ĉiuj eŭropaj landoj ne menciitaj sube.</i>
„	2	„	<i>Bulgarujo, Egiptujo, Finnlando, Grekujo, Izraelo, Pollando, Rumanujo, Sudafriko, Turkujo.</i>
„	3	„	<i>Rusujo (eŭropa).</i>
„	5½	„	<i>Hindujo.</i>
„	8	„	<i>Orienta Ĉinujo.</i>
„	9	„	<i>Japanujo.</i>
„	9½	„	<i>Aŭstralio.</i>
„	11½	„	<i>Nov-Zelando.</i>
Forprenu	1	„	<i>Islando.</i>
„	3	„	<i>Brazilo.</i>
„	3½	„	<i>Urugvajo.</i>
„	4	„	<i>Argentino, Ĉilio, Orientaj Kanado kaj Usono.</i>
„	6	„	<i>Guatemalo, Meksikio.</i>

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Centra Oficejo : Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

OFICIALA INFORMILO

N-ro 242

13-an de Sept. 1952

Komitatanoj B. Laŭstatute “La Delegitoj elektas el internacia listo unu Komitatanon por 250 Delegitoj. La Vic-Delegitoj kaj Fak-Delegitoj ne partoprenas tiun voĉdonadon.” La venonta elekto okazos en printempo 1953.

Ĉiu delegito havas la rajton proponi iun delegiton (sed ne VD aŭ FD) kiel kandidaton, sed la proponito devas havi la subtenon de kvin delegitoj por aperi en la listo.

Kandidato devas antaŭe promesi ke li plenumos la devojn de la ofico, se elektita, kaj ke li ĉeestos la kunsidojn de la komitato en la kongresoj.

Proponojn, kun informo pri la Esperanta agado de la kandidato, oni sendu tiel ke ili atingos la oficejon de U.E.A., Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo, antaŭ la 15a de februaro 1953.

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la 31a de aŭgusto, kaj ankaŭ, por komparo, je la sama dato en 1951 :

	1951	1952
Asociaj membroj	6667	6817
Individuaj membroj		
MJ	858	888
MA	4461	3710
MS	275	508
Patronoj ..	16	10
DM	228	263
HM	59	58
	5897	5437
	12564	12254

DELEGITOJ

Andoro

Sant Juliá de Loria. D : vakas.

Argentino

San Francisco. D : vakas.

Britujo

Windsor. D : vakas.

Danlando

Thyregod. D : vakas.

Egiptujo

Giza. D kaj FD : vakas.

Germanujo

Lehrte (Han.). FD (Instruado) : H. Müller, Am Gehrkamp 27-I.

München. FD (Fervojoj) : K. Simon, Lutzstr. 92-III, München 42 (Laim).

Neustadt a/Weinstrasse (22b). D : Prof. J. Schneider, Karolinenstrasse 47.

Worms. D : F. Pfaff, Sebastian-Münster-Strasse 12.

FD (Pedagogio) : La D.

Hispanujo

Barcelona. FD (Turismo) : J. Travesset Pijoan, str. Cartagena 311. Tel : 25.50.77.

Irlando

Dublin. VD : L. O’Cuirc, 137 North Strand Road. Tel : 46957.

Kubo

Sagua La Grande. D : C. S. Mederos, Apartado No. 15.

Nederlando

Ĉefdelegito : Jakob Telling, Schietbaanlaan 106-a, Rotterdam C. Tel : 0-1800-50871. Pĉk. 2426-19.

Portugalujo

Seixal. D : P. de Assunção Bagina, Aldeia de Paio-Pires.

MEMBRO-SUBTENANTOJ 1952

509. Näslund, F-ino E., Uppsala, Svedujo

510. Morton, F-ino H. R., London, Anglujo

511. Olsson, F-ino A., Göteborg, Svedujo

512. Kellermann, S-ino M., Wien, Aŭstrujo

513. Cross, S-ro O. H., Jonesboro, Tenn., Usono

514. Michling, S-ino I., Hannover, Germanujo.

DONACOJ. F-ino F. McLaren 10ŝ., S-ino E. M. Kendrick 100ŝ.

Sinceran dankon al ĉiu helpanto.

CECIL C. GOLDSMITH, *Sekretario.*

ANONCETOJ

Kosto : du pencoj por ĉiu vorto, aŭ internacia respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

Ĉiu anoncanto morale devigas sin respondi minimume unu fojon al ĉiu kiu skribas.

Anonceto por iu numero devas atingi nin antaŭ la 6-a de la antaŭa monato.

Kaj vi estos trankvila, ĉar ekzistas espero ; Vi rigardos ĉirkaŭen, kaj iros dormi en sendanĝereco. Ijob. 11. 18.

Esperanto-Asocio de New York kunvenas ĉiumonate. Ĉiuj bonvenaj. Telefonu : BU-4 0963. Dormont.

LERNIGU VIAJN INFANOJN laŭ la angla maniero ! Progresema lernejo sendependa bezonas internulojn el ĉiuj landoj. Vidu kovrilpaĝon 4 de la maja numero kaj skribu al la lernejestro, Caius School, Kingston Buci, SHOREHAM-BY-SEA, Sussex, Anglujo.

Ilustritajn poŝtkartojn sendu amase tutmonde por entuziasmigi 20 novajn gelernantojn. . . Nepra respondo. Niteroi Esperanto-Klubo, Caixa Postal 10, NITEROI, Brazilo.

Ekstereŭropajn korespondantojn serĉas (39-jara) Jaromir Pavlacky, VESELI NAD MORAVOU, Ĉeĥoslovakujo.

Slovaka grupo Esperantista anoncas : fidela anino de nia movado fariĝos la 22-an de oktobro 21-jara. Gratulojn bonvolu sendi al f-ino Vera Ratislavová, VESELI NAD MOROVOU 928, Ĉeĥoslovakujo.

S-ro Karl-Axel Danielsson, Skolan, LEKSBERG, Svedujo, deziras interŝanĝi bele afrankitajn il. pk. kun la tuta mondo kaj interŝanĝi pm. laŭ kvanto aŭ katalogo. Deziras speciale ricevi pm. kun muzikaj motivoj. Nepre respondos.

Rotarianoj-Esperantistoj ! Ĉiu estas petata sendi la jenan informon—klubo, klasifiko, ofico — al Rotariano C. C. Goldsmith, Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo.

Por numismatika kolekto estas dezirata interŝanĝo de banknotoj ĉefe kun la landoj ekster Eŭropo. Bonvolu skribi al s-ro Vilho Salonen, Sepänkatu 4-8 C 51, TAMPERE, Finnlando. La anonco daŭre validas.

Adventisto de la sepa tago deziras korespondi kun samkreduloj en la tuta mondo. Adreso : Paulo Amorim Cardoso, Caixa Postal 341, FORTALEZA, Ceará, Brazilo. Efesanoj 1. 2.

Giordano B. López, Amalia 347, Buenos Aires 8, Argentino. 50-100 pm. ripetitaj aŭ ne, kun ĉiuj landoj.

Lernantoj, 13-14 jaraj, deziras korespondi kun gesamaĝuloj alilandaj. Skribu al S-ro Goulding, Rueensberry Road County Modern Boys School, Longton, STOKE-ON-TRENT, Anglujo.

Vizitantoj al Britujo povas mendi ĉambrojn en hoteloj ; biletojn por koncertoj, teatroj, k.c. ; fervojajn biletojn ; pere de Brita Esperantista Asocio, 140 Holland Park Avenue, London, W.11 (Tel : PARK 7821). Kun informpetoj sendu unu rpk. kaj citu la kodvorton, **Elizabeto**.

Nia unua letervespero okazos 3.11.52. Sendu bonvole leteron, poŝtkarton aŭ broŝuron al "La Esperantisto", Den lille Skole, JYDERUP, Danlando.

Mile Milkoviĉ, jugoslava studento. Kiu konas ties adreson sciigu ĝin al Georg Englert, Rathochstr. 83, München-Obermenzing, Germanujo.

Esperanto-Unuiĝo Essen-Ruhr, Germanujo kunvenas regule. Gekursanoj deziras korespondi. Adreso : Demrathkamp 28. Tel : 74231.

I. A. P. K.

3 Kongresaj poŝtstampoj (Malmö, München, Oslo)	..	3 ŝil.
50 I.A.P.K.-glumarkoj		1 ŝil.
20 Unuatagkovertoj Skandinavaj		30 ŝil.
25 ,, Ĉeĥoslovakaj		40 ŝil.
5 ,, Islandaj		20 ŝil.
18 ,, Usonaj		20 ŝil.
50 Morigaj poŝtstampoj Svedaj		17 ŝil.
10 Flugpoŝtstampoj		17 ŝil.

Pageblaj al Universala Esperanto-Asocio.

Internacia Asocio de Poŝtmark-Kolektantoj
Box 5085, Göteborg 5, Svedujo

LA “EPOKO” LIBROJ

Serio de interesaj romanoj k.s. por la distra horo

La plej popularaj libroj en Esperantujo

N-ro 1 ĝis 6 po 2ŝ. 3p. aŭ 7 rpk. aŭfrankite

N-ro 7 ĝis 11 po 4ŝ. 3p. aŭ 13 rpk. aŭfrankite

1. **Murdo en la Orienta Ekspreso** Agatha Christie (“Etulo”)
 2. **La Knaboj de Paŭlo-Strato** Francisko Molnár (L. Spierer)
 3. **La Princo kaj Betty** P. G. Wodehouse (G. Badash)
 4. **La Tempo-Maŝino kaj La Lando de la Blinduloj** H. G. Wells (E. W. Amos)
 5. **Princino de Marso** Edgar Rice Burroughs (K. R. Sturmer)
 6. **Colomba** Prosper Merimée (J. Beau)
 7. **Sep Vangofrapoj** Karlo Aszlanyi (L. Spierer)
 8. **La Virineto en Bluo kaj aliaj rakontoj** Mason Stuttard
 9. **Brulanta Sekreto kaj aliaj rakontoj** Stefan Zweig (K. R. kaj P. E. Schwerin)
 10. **Kiso de la Reĝino** I. F. Naĵivin (D. Staritsky)
- KAJ TUTE NOVA**
11. **La Karnavalo kaj la Somnambulino** K. L. Immermann (A. E. Wohlthat)

Eldonitaj de

THE ESPERANTO PUBLISHING CO. LTD., ANGLUJO

Mendu ĉe enlanda libroservo aŭ ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

